

Ukrainio: Venkas Viktor

31a jarkolekto - aprilo 2010/04

Monato

INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

Monata revuo en Esperanto - Maandelijks - Antwerpen X - ISSN 0772-456 X

**Kun la legomoj
kreskas
amikeco**

**Belgio eksportas
siajn krimulojn**

**De Gutenberg al iPad:
survoje al libro-normo**



s honestaj kaj ka-
plej fortaj gar-
Pro tio ili estas
ataj homoj sur nia
aroj ne povas to-

Germanio inter la
ĵurnalisto devis
, sed tute aparte
e Hitler.

a degeneriĝo Kurt
elokventan voĉon
fuzis fuĝi, ĉar li
vas agi kvazaŭ ĉio

Trevor Steele
Kvazaŭ ĉio
dependus de mi

Trevor Steele

Kvazaŭ ĉio dependus de mi

“Aŭtoro je vere monda nivelo”

Gerrit Berveling



Ĵurnalistoj, se ili estas honestaj kaj kapablaj, estas inter la plej fortaj gardantoj de demokratio. Pro tio ili estas inter la plej endanĝerigataj homoj sur nia planedo: koruptaj registaroj ne povas toleri oponantojn.

En la tumulta epoko de Germanio inter la du mondmilitoj sentima ĵurnalisto devis oponi ĉiujn ŝovinistojn, sed tute aparte la levigantan movadon de Hitler.

En tiu tempo de morala degeneriĝo Kurt Lenz kuraĝis levi sian elokventan voĉon kontraŭ barbareco kaj rifuzis fuĝi, ĉar li kredis, ke ĉiu el ni devas agi *kvazaŭ ĉio dependus de mi*.

Serio Stafeto n-ro 34
Eldonjaro: 2009

Klasika bindita versio: formato 135 x 205 mm, pezo 380 g,
344 paĝoj, ISBN: 978-90-77066-41-6;
prezo ĉe FEL: 19,20 EUR + afranko.

Kiel e-libro (ePub, Mobi aŭ PDF): prezo ĉe FEL: 11,50 EUR

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen, Belgio.

Rete: www.retbutiko.net - rebutiko@fel.esperanto.be

Forfalas la landlimoj

Antaŭ 19 jaroj civitanoj de mia patrujo ekdormis en unu regno, sed vekigis en diversaj novaj landoj. Tiel ni vivis, momente fariĝinte fremduloj al sampatrujanoj el frataj respublikoj.



8

politiko

OPINIO	8
Forfalas la landlimoj	
NUKLEAJ ARMILOJ	9
Varmaj vortoj pri malvarma milito	
BALKANIO	9
Paralela ne plu	
UKRAINIO	9
Venkas Viktor	

moderna vivo

ĜARDENOJ	10
Kun la legomoj kreskas amikeco	
OPINIO	11
Unu ŝtato, du landoj	
KUNLABORO	12
Belgio eksportas siajn krimulojn	
ALBANIO	12
Pasporto al sekureco	
FRAŬDADO	13
Melkante la ŝtaton	
RUSIO	14
Ludoj kun tempo	

hobio

RADIO KAJ TELEVIDO	15
Ricevi persatelite	

medio

Brita humuraĵo.....	18
FRANCIO	19
Pli kaj pli verda konsciigo	

komputilado

DE GUTENBERG AL IPAD	20
Parto 1:	
Survoje al iu libro-normo	
INTERRETO	23
Pli da diskriminacio en Interreto	

libroj

Ĉarma, originaltema kaj pensiga.....	24
--------------------------------------	----

› Abonoj.....	4
› Enkonduko.....	5
› Leteroj.....	6
› El mia vidpunkto.....	7
› Anoncetoj.....	27

Kun la legomoj kreskas amikeco



10

Antaŭ du generacioj multaj domposedantoj kulturis ĝardenon apud la domo. Multaj fieris pri sia ĝardeno, sed dum la prospera periodo inter proksimume 1980 kaj 2000 multaj domposedantoj ne emis ĝardenumi, kaj tion ne lernis la nova generacio. Tamen dum la lastaj kelkaj jaroj, precipe dum la malprospera periodo, homoj komencis denove ĝardenumi.

Melkante la ŝtaton



13

Antaŭ kelkaj semajnoj nekonato ofertis al la registaro en Germanio komputilo-diskon kun ŝtelitaj informoj pri kontoj en Svisio. Riĉuloj kaŝe deponas sian monon en svisaj bankoj por eviti germanajn impostojn. Tio estas kontraŭleĝa kaj kontraŭsocia.

► Rekto al la eldonejo ...

- > Per via FEL-konto.
- > Per UEA-konto al la konto fela-x de Flandra Esperanto-Ligo.
- > El Belgio al konto 000-0265338-43 de Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno.
- > El Eŭrolando al IBAN-konto de Flandra Esperanto-Ligo, BE66 0000 2653 3843 (BIC-kodo BPOTBEB1), Postbank 1000 Brusel.
- > El Usono per ordinara usona ĉeko.
- > Per Visa aŭ Mastercard. Sendu la numeron, kontrolnumeron kaj validodaton fakse al +32 32 33 54 33, letere al Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen aŭ rete al retbutiko@fel.esperanto.be.
- > Per internacia poŝtmandato nome de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen.
- > Per Paypal al konto financo@fel.esperanto.be
- > Per bankĉeko tratita je belga banko en eŭroj. Aldonu 12 eŭrojn pro la bankkostoj.

Bv. noti, ke personaj ĉekoj ne plu estas akceptataj en Belgio.

► Tarifoj

Ŝtato de la paganto		MONATO			LA JARO aere	
		surface	aere	rete	3a klaso	1a klaso
Argentino	EUR	25	28	15	5,5	9
Aŭstralio	AUD	87	92	52,2	9,5	15
Aŭstrio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Belgio	EUR	49	58	29,4	5,5	9
Brazilo	EUR	25	28	15	5,5	9
Britio	GBP	44	47	26,4	5	7
Bulgario	EUR	27	30	16,2	5,5	9
Ĉeĥio	EUR	35	38	21	5,5	9
Danio	DKK	366	396	219,6	41	65
Estonio	EUR	27	30	16,2	5,5	9
Finnlando	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Francio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Germanio (ok.)	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Germanio (or.)	EUR	47	51	28,2	5,5	9
Grekio	EUR	47	51	28,2	5,5	9
Hispanio	EUR	47	51	28,2	5,5	9
Hungario	HUF	7400	8200	4440	1500	2410
Irlando	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Islando	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Israelo	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Italio	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Japanio	JPY	7980	8500	4788	860	1200
Kanado	CAD	78	84	46,8	9	14
Kipro	EUR	35	38	21	5,5	9
Koreio	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Kostariko	EUR	25	28	15	5,5	9
Kroatio	EUR	27	30	16,2	5,5	9
Latvio	EUR	27	30	16,2	5,5	9
Litovio	EUR	27	30	16,2	5,5	9
Luksemburgo	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Malto	EUR	35	38	21	5,5	9
Nederlando	EUR	49	53	29,4	5,5	9
Norvegio	NOK	430	460	258	48	71
Nov-Zelando	NZD	105	111	63	11,5	18
Pollando	PLZ	115	126	69	23	36
Portugalia	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Rusio	EUR	25	28	15	5,5	9
Serbio	EUR	27	30	16,2	5,5	9
Slovakio	EUR	27	30	16,2	5,5	9
Slovenio	EUR	35	38	21	5,5	9
Sud-Afriko	EUR	43	46	25,8	5,5	9
Svedio	SEK	499	543	299,4	56	84
Svislando	CHF	82	88	49,2	9	14
Usono	USD	78	82	46,8	8	13
Baza tarifo	EUR	49	53	29,4	5,5	9

► aŭ pere de peranto ...

- > **Aŭstralio:** Libroservo de AEA, 4/23 Albura Street, Battery Point Tas 7004, Australia. Reto: libroservo@esperanto.org.au.
- > **Aŭstra:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, 3400 Klosterneuburg. Pĉk. 7 127 744. Reto: leopold.patek@esperanto.at.
- > **Belga:** Vlaamse Esperantobond, Frankrijklei 140, 2000 Antwerpen (pĉk. 000-0265338-43). Reto: financo@fel.esperanto.be.
- > **Brazila:** Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 3625, 70084-970 Brasilia. Reto: bel@esperanto.org.br.
- > **Brita:** Viv O'Dunne, Esperanto-Asocio de Britio, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent, ST12 9DE, Britio. Reto: eab@esperanto-gb.org.
- > **Ĉeĥa:** Pavel Polnický, Kunštátská 1350/III., 290 01 Poděbrady, tel. 325 615 651. La konto de ĈEA en Komerční banka: 3330 021/0100, variab. symbol por gazeto Monato: 07001. Reto: cea.polnický@quick.cz.
- > **Dana:** Revuservo de DEA, Arne Casper, Bryggervangen 70, 4. Tv., DK-2100 København Oe. Tel.: +45 39 20 63 48 Poŝtel.: +45 21 40 84 87. Reto: arne-casper@email.dk.
- > **Estona:** Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-93812 Kuressaare. Reto: virveernits@hotmail.ee.
- > **Finna:** Päivi Saarinen, Esperanto-Asocio de Finnlando, Siltasaarekatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki, Finnlando. Reto: eafoicejo@esperanto.fi
- > **Franca:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (pĉk.: 855-35 D Paris). Reto: esperanto-france@esperanto.org.
- > **Germanaj:**
 - > Abo-Servo "ESPERO", Rolf Beau, Eißer Kirchweg 18, DE-27333 Schwering, (Commerzbank Hoya, Kontonumero: 0 420 933 400, BGN: 290 400 90) Reto: robo.espero@acn-mail.de.
 - > Hans Dieter Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein (Postbank Ludwigshafen, pĉk 91856-676 (BLZ 54510067)). Reto: HDP@internacia-festivalo.de.
 - > Esperanto-Buchversand Dr. Wolfgang Schwanzler, Pfarrer-Seeger-Str. 9, D-55129 Mainz. Reto: wolfgang.schwanzler@esperanto.de.
- > **Hispana:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat, 1008, E-08200 Sabadell (Caixa d'Enginyers, 3025-0002-47-1433276794). Reto: kea-kasisto@esperanto.cat.
- > **Hungara:** AbonaSoft, HU-1093 Budapest, Bakatsu. 1/3III.1. Reto: abonasoftware@gmail.com.
- > **Irlanda:** Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 12. Reto: noviresp@eircom.net.
- > **Islanda:** Islanda Esperanto-Federacio, Pósthólf 1081, IS-101 Reykjavík. Reto: esperant@ismennt.is.
- > **Itala:** Itala Esperanto-Federacio, Via Villorresi 38, I-20143 Milano (pĉk.: 37312204). Reto: f.esp.it@infinito.it.
- > **Japana:** Japana Esperanto-Instituto, Wasedamati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokio 162. Reto: esperanto@jei.or.jp.
- > **Kanada:** Kanada Esperanto-Asocio, p/a Yves Bellefeuille, kasisto, 2372 Haddington, Ottawa, Ontario K1H 8J4. Rete: yan@storm.ca
- > **Korea:** Seula Esperanto-Kulturcentro, 601

- ho, Dongboog B/D 12-3, 2 ga Choongmu-ro Chung-ku Seulo, Koreio. 100-860. Rete: esperanto@saluton.net.
- > **Kostarika:** Hugo Mora, Apartado 4981, 1000 San José. Reto: miaumiau1@ice.co.cr
- > **Kroata:** Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Reto: marija@hes-keu.hr.
- > **Latva:** Margarita Zelve, str. Rupniecibas 35-13, Riga, LV-1045, Latvio. Tel.: +371 6407174. Reto: Margarita@rsu.lv.
- > **Litova:** Laimius Stražnickas, LEA, a.k.187, LT-01003 Vilnius-C, Litovio. Reto: laimiuslt@gmail.com.
- > **Luksemburga:** LEA, 1 rue de Kehlen, 8394 Olm (pĉk.: CCPLULL IBAN LU50 1111 0089 3612 0000). Reto: wickler.albert@gmx.net
- > **Nederlanda:** UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Reto: uea@inter.nl.net.
- > **Norvega:** Eldonejo Esperanto A/S, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo 5. Reto: inform@esperanto.no.
- > **Nov-Zelanda:** G. David Dewar, 24 Date Crescent, Christchurch 8025. Reto: gdewar@ihug.co.nz.
- > **Pola:** Danuta Leyk, ul. Miedzzyborska 117 m 8, PL-04-013 Warszawa, konto 06-1020-1156-0000-7102-0036-6328 ĉe PKO BP XIV O/Wwa. Reto: dankal@epf.pl.
- > **Portugala:** Portugala Esperanto-Asocio, R. Dr. Joao Couto 6, r/c A, P-1500-239 Lisboa. Reto: portugala@esperanto.web.pt.
- > **Ruslandaj:**
 - > Halina R. Gorecka, RUS-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1248, Ruslando. Reto: sezonoj@gazinter.net.
 - > Mikaelo Ĉertilov, Pf. 21, RUS-143006 Odincovo 6, Ruslando. Tel.: 095-5934964. Banko: "AVTOBANK-NIKOIL", konto N.: 42301.810.3.0018.0084867. Reto: mikaelo@km.ru.
 - > **Serba:** Zoran Ćirić, Branka Miljkovića 14, 18000 Niš, tel. +381-18-522 582, poŝtel. +381-63-7200 616. Reto: zciric@eunet.yu
- > **Slovenaj kaj Slovakaj:**
 - > Višnja Brankovič, Via Parini 5, I-34129 Trieste. Reto: visnja.brankovic@os.htnet.hr.
 - > Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Reto: marija@hes-keu.hr.
 - > **Sud-Afrika:** Colin Beckford, 43 Fairview Crescent, Milnerton Ridge, 7441. Reto: cbeckford@telkomsa.net.
- > **Svedaj:**
 - > Esperanto-Skolan, Svenska Arbetar Esperanto-Förbundet, Svartviksvägen 14, S-123 52 Farsta, p.ĝ. 5 31 60 - 8. Reto: person.esperanto@telia.com.
 - > Sveda Esperanto-Federacio, c/o Lisbet Andreasson, Kajsa Kavats gata 8, SE-242 35 Hörby, Svedio. Reto: bertil.andreasson@horby.mail.telia.com.
 - > **Svisa:** Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen, ĝirkonto 40-52 612-7 Basel. Reto: ch_scheidegger@bluewin.ch.
 - > **Usona:** ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530. Tel.: +1 510 653 0998, Fakso: +1 510 653 1468. Reto: elna@esperanto-usa.org

Aŭtomat-homo

Lastatempe mi aĉetis novan, pli rapidan telefonsistemon. Germana Telekom en la prospekto skribis, ke la instalado estas simpla. Mi ricevis tri diversajn aparatojn kun multaj kabloj, inter ili „Multimedia-Receiver“ (germanaj produktoj kompreneble havas preskaŭ nur anglajn nomojn). La (ne tiom) „simpla“ instalado memorigis min pri IKEA unuflanke kaj pri mia knaba aĝo aliflanke. La sveda kompanio IKEA inventis puzlomeblojn. Pratempe oni aĉetis ŝrankon, kiun liveris kamiono, kaj du fortikaj viroj enportis kaj starigis ĝin en la ĉambro. Ĉe IKEA vi aĉetas kelkajn pakaĵojn, devas mem transporti ilin hejmen, elpaki el multaj plastaj folioj kaj ŝaummaterialo kaj mem munti ŝrankon. La konstruopiano estas farita por analfabetoj: desegnaĵoj gvidas nin tiel ke post unu tago ni eventuale sukcesas kunmeti ĉion. IKEA konsekvence realigis la sistemon de mem-servado. (Cetere, preskaŭ ĉiuj aliaj meblopro-

duktistoj nun uzas la saman puzloteknikon – la konkurenco ne dormas ...)

Memservado hodiaŭ reguligas nian tutan klientovivon. Kiam mi estis knabo, kutime panjo sendis min aĉeti en proksima vendejo. Estis ĉiam vico da klientoj, kiuj kune babilis en agrabla etoso. Hodiaŭ mi trakuras en superbazaro longajn koridorojn por trovi varon; kiam mi vane serĉas kaj demandas homon en vendejo uniformo, tiu respondas aŭ (en bela eksterlandgermana lingvo) „Ik nix wissen“ (= mi scias nenion) aŭ, se estas indiĝeno: „Bedaŭrinde ni ne havas.“ Se mi jam konas la superbazon, mi rapide sukcesas kolekti ĉion. Atendi tamen mi devas same longe kiel la tiama knabo, nun tamen en serpenta vico antaŭ la kaso. Memservado intertempe aplikas torturajn aparatojn: biletojn por tramo kaj trajno mi devas aĉeti per aŭtomato, monon mi ne plu ricevas ĉe bankogiceto de afabla homo, kiun oni konas de multaj jaroj kaj kun kiu

oni volonte babilas iomete, sed per aŭtomato, kun kiu ne eblas konversacii. Se mi aĉetas trajnbileton ne per aŭtomato sed ĉe giceto kun vivanta homo, mi devas pagi du eŭrojn pli. Se aŭtomato ĉe haltejo ne funkcias kaj mi tamen uzas la tramon, mi riskas 40 eŭrojn da punpago; tramŝoforoj ne plu vendas biletojn, ĉar la kompanio volis ŝpari (duonan jaron poste ĝi altigis la biletprezojn). Mi atendas la tagon, ekde kiam mi mem devos stiri tramon, buson kaj trajnon (tiel realiĝos la knaba revo pri la laboro de lokomotivestro!). Cetere post du monatoj ni sukcesis instali la lastan teknikan detalon de la nova telefonsistemo ... Ho, kia bela vivo de aŭtomat-homoj!

PS: Kvankam supran tekston mi verkis dum karnavalo, mia plendo estas serioza!

Sincere via



Stefan MAUL



www.monato.net

MONATO, internacia magazino sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo en la internacia lingvo Esperanto; fondinto: Stefan Maul; 31a jarkolekto; aperas principe la 1an de ĉiu monato, escepte de aŭgusto; abontarifo varias laŭlande.

100 konstantaj kunlaborantoj kaj korespondantoj en 45 landoj; legantoj en 65 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaĵoj (ne tradukoj); represo kaj tradukoj el MONATO nur kun indiko de la fonto; kopi-rajto ĉe la eldonejo; ekzistas kaseda versio de MONATO por blinduloj, mendu ĝin pagante 12 EUR al UEA, konto robm-b; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de l' eldonejo.

Verantw. uitgever: Paul Peeraerts, Frankrijkplei 140, B-2000 Antwerpen.

eldonejo:

Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijkplei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio; telefono: +32 3 234 34 00, telekopii: +32 3 233 54 33, retpoŝto: eldonejo@monato.net, Skype-telefono: fel-monato; valida anoncitarifo: n-ro 9; kompostita, presita kaj vinkita en la eldonejo.

ĉefredaktoro:

Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg.
Rete: chefredaktoro@monato.net.

reviziantoj:

Hèctor Alòs i Font, Edmund Grimley Evans, Katalin Kováts, Jens S. Larsen, Brian Moon, Anna kaj Mati Pentus, Alexander Schlafer.

redakcia sekretario:

Paul Peeraerts.
Rete: redakcio@monato.net.

grafiko:

Julia Litvinova.

redaktoroj:

• **Arto:** Claude Nourmont-Moon, 2 Om Kläppchen, L-5682 Dalheim, Luksemburgo. Rete: arto@monato.net.

• **Ekonomio:** Roland Rotsaert, Vispaanstr. 97, B-8000 Brugge, Belgio. Rete: ekonomio@monato.net.

• **Enigmoj:** Jean Pierre VandenDaele, Hisselsgasse 85, B-4700 Eupen, Belgio. Rete: enigmoj@monato.net.

• **Eseo:** Sendu al la koncerna redakto, depende de la temo.

• **Hobio:** Evgeni Georgiev, Porzellangasse 25/41, A-1090 Vieno, Aŭstrio.

Rete: hobio@monato.net.

• **Komputado:** Edmund Grimley Evans, 2 Comfrey Court, Cambridge, Britio CB1 9YJ.
Rete: komputado@monato.net.

• **Leteroj:** MONATO, Frankrijkplei 140, 2000 Antwerpen, Belgio.
Rete: leteroj@monato.net.

• **Libroj:** Boris Kolker, 6755 Mayfield Rd, Apt 312, Cleveland, OH 44124, Usono.
Telefono 440-646-1482.
Rete: libroj@monato.net.

Noto: Librorecenzojn oni ne sendu al la redaktoro proprainiciate. La kunlaborantoj ricevos la librojn kaj la recenzopetojn de la eldonejo.

• **Lingvo:** Yamasaki Seikō, Higasi Koigakubo 3-18-12 Kokubunzi-5, 185-0014 Tokio, Japanio.
Rete: lingvo@monato.net.

• **Medio:** Slezák Tamás, Damjanich u.12, HU-9200 Mosonmagyaróvár, Hungario.
Rete: medio@monato.net.

• **Moderna vivo:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio.
Rete: moderna_vivo@monato.net.

• **Noveloj kaj Poezio:** sendu

viajn kontribuojn al la eldonejo:

Monato, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijkplei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

Rete: noveloj@monato.net.

• **Politiko:** Paul Gubbins, 3 Arden Court Mossley, CW12 3JH Congleton, Cheshire, Britio.

Rete: politiko@monato.net.

• **Scienco:** Thomas M. Eccardt, 455 E 14th St. #3C, New York, N.Y. 10009, Usono.
Rete: scienco@monato.net.

• **Spirita vivo:** Gerrit Berveling, Kalverstraat 8 B, NL-8011 LH Zwolle, Nederlando.
Rete: spirita_vivo@monato.net

• **Sporto:** provizore sendu viajn kontribuojn al la eldonejo: Monato, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijkplei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.
Rete: sporto@monato.net.

• **Ŝerco kaj satiro:** Stefan Maul, Pferseer Str. 15, D-86150 Augsburg, Germanio. Rete: sherco_kaj_satiro@monato.net.

• **Turismo:** Evgeni Georgiev, Porzellangasse 25/41, A-1090 Vieno, Aŭstrio.
Rete: turismo@monato.net.

Neglektinda opozicio

Denove ŝokis min vica raporto pri Albanio (MONATO 2010/2, p. 8). Sub la titolo „Parlamento preskaŭ unupartia“, ankaŭ frontpaĝa, la aŭtoro klarigas, ke la plej reprezentita partio atingis precize la duonon de la parlamentaj seĝoj. El tio plej verŝajne sekvas, ke preskaŭ unupartiaj parlamentoj en la mondo estas, inter aliaj, la usona, la brita kaj la franca, kaj entute, ke la (preskaŭ) unupartiaj landoj en la mondo timinde estas multe pli oftaj, ol ni kredis. Feliĉe en Albanio venkis demokratoj, pro kio ni ĝojas, ke nedemokratoj fariĝis neglektindaj. Ĉu plene neglektindaj? Tamen ne: bedaŭrinde demokratoj bezonis unu nedemokratan voĉon por starigi registaron. Zorginde!

Hektor ALOS | FONT
Rusio

Naturo de scienco

En la februara numero (MONATO 2010/2, p. 22) aperis grava eraro pri la naturo de la scienco. En la eseo Durwael citas Halvelik: „Kvantumfiziko kaj Relativeco plu ne validas pro internaj sinkontraŭdiroj.“ Tute ne. Estas ja konate, ke en la plej ekstremaj kondiĉoj, kie la kvantumfiziko kaj la ĝenerala relativeco kunplektiĝas, ekzemple en la ekesto de la universo aŭ ene de nigra truo, ni ankoraŭ ne scias, kiel venki la nuntempe konatajn internajn sinkontraŭdirojn. Sed tio senvalidigas nek la kvantumfizikon, nek la ĝeneralan relativecon! Ambaŭ sistemoj donas treege precizajn kaj fidindajn rezultojn en siaj respektivaj kampoj de valideco. Kvantumfiziko bonege traktas la malgrandan mondon de atomoj kaj nukleoj, kaj ĝenerala relativeco bonege traktas la grandan mondon de steloj kaj galaksioj, kaj eĉ la ĝusta funkciado de la tuttera pozicitra sistemo baziĝas sur ĝenerala relativeco. Notu, ke eĉ la klasika mekaniko de Newton ankoraŭ estas vaste uzata en sia kampo de valideco; se objekto ne estas tre malgranda (kio bezonus trakton pere de kvantumfiziko), ne estas tre granda (kio bezonus trakton pere de ĝenerala relativeco) kaj ne moviĝas kun rapido komparebla kun la rapido de la lumo (kio bezonus trakton pere de speciala relativeco), la teorio de Newton funkcias tute bone, do en tre vasta kampo de aplikeblo.

Ne estas vere, ke la teorio de Newton ne plu validas; veras, ke ni

nun konas limojn de ĝia valideco. La pli novaj teorioj de la dudeka jarcento ege pligrandigas la kampon de aplikeblo al la malgrando kaj la granda kaj la alta rapido, sed eĉ ili ne aplikeblas vere ĉie, kaj ni jam konas la limojn de tiu multe pli vasta kampo de aplikeblo. Fizikistoj nun strebas kompreni, kiel apliki la teoriojn de kvantumfiziko kaj ĝenerala relativeco en tiuj malmultaj, ekstremaj situacioj, kie ambaŭ rolas (iuj opinias, ke la „kordoteorio“ povas esti la solvo).

Bruce SHERWOOD
Usono

Kurioza pensmaniero

Mi havas nur unu plendon ne kontraŭ la redakcio, sed kontraŭ tiuj personoj, kiuj en la rubriko *Leteroj* senfine atakas prezidanton Barak Obama pro liaj „malhonesto kaj neinteligenteco“. Mi mem ne konas Ryan, „kiu estas en prizono“ laŭ Allan Foster el Ĉikago (MONATO 2010/1, p. 6). Ĉu iu ajn en la internacia komunumo scias ion ajn pri tiu prizonulo? Tia elipse unuvoja diskuto estas kurioza pensmaniero. Kiel okazis, ke Obama sukcese diplomitiĝis en la altprestiga leĝfako de la universitato de Harvard kaj eĉ instruis konstitucian leĝon? Kian malhonestan agon faris Obama en sia unujara deĵoro kiel usona prezidanto?

Elsin B. SNOW
Usono

Ĉu satanisto povas administri ekleziojn? (2)

Mi ĝojas pri legantoj, kiuj kun intereso legas la prireligiajn artikolojn kaj komentojn, speciale se ili tion faras arde, kun vera animintereso. Sed malpli mi ĝojas, se iu paralele kun animardeco kaj fervoro forgesas pri preciza legado kaj pri logiko. Mi havas impreson, ke tio okazis en la reagletero de Armando Zecchin (MONATO 2010/3, p. 6). Li supozas pri mia artikolo aferojn, kiujn mi ne nur ne esprimis, sed ilin eĉ klare kontraŭdiris. Tiel mi jam en la unua alineo diris: „Mi estu justa: ne temas nepre pri vera satanisto, sed pri akuzo de unu el la ekzistantaj religiaj komunumoj en Slovenio ...“ Do neniu povas al mi riproĉi konsideri sinjoron Guliĉ satanisto. Kiel Armando Zecchin prave diras, mi vere ne povas scii, ĉu li estas ateisto, kiel li asertas, aŭ ne. Tamen, eble sinjoro Zecchin povus klari-

gi, ĉu estas verŝajna la supozo, ke oni estas nove naskita en la kristana senco, kaj tamen demonstras proksimon al proklamitaj satanistoj kaj asertas esti ateisto?

Mi supozas, ke Armando Zecchin ne intencis protekti sinjoron Guliĉ antaŭ mia (cetere neokazinta) atako, sed ke lin provokis mia tezo, ke rilate la novnaskiĝon la ateisto kaj la katoliko troviĝas je sama pozicio; kaj se tiel, ili ankaŭ same, se vere kredante tion, kion instruas ĉu la katolika ĉu la ateisma religioj, estas kandidatoj por satanisma aparteno. Neniun personon mi markis per la nomo ateisto aŭ katoliko aŭ satanisto. Mi ne havas envidon en la koron de la homoj, do mi ne povas scii, kiu estas nove naskita kaj kiu ne. Nur Dio scias. Sed mi ne parolis persone, mi parolis principe. Kaj principe la ateisma, rekte satanisma aŭ katolika religioj ne per samaj instruoj, sed tamen per sama distanco de la biblia instruoj, troviĝas samdistance de la vera kristana kredo kaj tiel ankaŭ de la efektiva novnaskiĝo.

Vinko OŠLAK
Aŭstrio

Monato malpliigas usonan deficiton

En sia marta Enkonduko (2010/3, p. 5) MONATO skribis, ke la usona buĝeto antaŭvidas ŝuldon de 3,8 miliardoj da dolaroj. Se tio verus, prezidanto Obama estus tre kontenta. La realo tamen similas al la miloblo, nome al 3800 miliardoj da dolaroj. (red.)

La rubriko „Leteroj“ estas malferma por koncizaj (maksimume 150-vortaj) reagoj de legantoj pri aktualaj artikoloj aperintaj en MONATO. La redakcio faras propran elekton, post lingva kaj stila polurado.

Letero, ankaŭ reta, estu subskribita per la nomo, kompleta stratadreso kaj telefonnumero. Per la sendo de la letero la aŭtoro donas sian permeson publikigi ĝin en la papera kaj en la reta versioj de MONATO.

Leteroj por publikigo estu senditaj al leteroj@monato.net aŭ al MONATO, Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio.

Politika dekadenco

Stefan MAUL

Ne malofte ni plendis ĉi-loke pri evidenta fakto, ke pli kaj pli ni havas nur mez- kaj sub-kvalitajn politikistojn, kiuj eĉ ne kapablas fari taŭgajn leĝojn. En Germanio la konstitucia kortumo jam plurfoje devis korekti fuŝe kaj malzorgeme ellaboritajn leĝojn, kiuj parte eĉ ne kongruis kun bazaj konstituciaj principoj. Laste la kortumo postulis, ke la registaro devas reformi leĝon nomatan „Hartz IV“ [harc kvar], kiu kombinis pagojn al longtempaj senlaboruloj kun sociala subteno, do pago de la ŝtato al malriĉuloj sen sufiĉaj enspezoj. La juĝistoj konstatis, ke la financa subteno por infanoj pro multaj faktoroj estas kontraŭkonstitucia kaj tro malalta.

Malaltaj salajroj

Tuj estiĝis diskutado, kiu precipe atentigis pri la problemo, ke altigo de pagoj por infanoj ne nur konsiderinde ŝarĝos la ŝtatan buĝeton, sed malpliigos la diferencon inter sociala subteno kaj malaltaj salajroj. El tio povos rezulti, ke homoj kun laborlokoj enspezos malpli multe ol senlaboruloj, tiel ke tiuj lastaj tute ne havus interenson, serĉi laboron. Avertis Guido Westerwelle [véstervele], estro de la Libera Demokrata Partio (FDP): „Kiu laboras, tiu devas havi pli multe ol tiu, kiu ne laboras. Ĉio alia estas socialismo.“ Socialismo, aŭ eble pli ĝuste kapitalismo? Se oni volas argumenti polemike, oni povas aserti, ke milionulo, kiu ne laboras, do devas havi malpli multe ol purigistino, kiu ricevas horan salajron de eble 4 eŭroj ...

Por reveni al la realo: Ne estas hazardo, ke estas malgranda diferenco inter sociala subteno kaj malaltaj salajroj – volis kaj kaŭzis ĝin la politiko. Establis tion la tiama socialdemokrata kanceliero Gerhard Schröder [ŝreder]

helpe de Hartz-leĝoj, nomitaj laŭ amiko de Schröder, la tiama gvidanto de la aŭtokompanio Volkswagen [fólksvagen]. Li ellaboris tiujn leĝojn – kaj oni demandas sin, ĉu la deputitoj estis tro mallaboremaj aŭ tro stultaj por mem plani ilin. Leĝo Hartz I [harc unu] enkondukis malaltajn salajrojn, por tiel instigi entreprenojn dungi nekvalifikitajn homojn. Rezulte la entreprenoj ekspluatis tiun eblon kaj dungis senlaborulojn, ankaŭ kvalifikitajn, je subniveleaj salajroj. Tiel efektive pli kaj pli multaj homoj havis laborpostenojn, kio konsiderinde beligis la statistikon pri senlaboreco.

Lavango da procesoj

Fieris Schröder en 2006: „Ni konstruis unu el la plej bonaj sektoroj de malaltaj salajroj, kiu ekzistas en Eŭropo.“ Kion li prisilentis, estis kreskinta nombro de homoj, kiuj procesis kontraŭ Hartz IV. Pro tio sole en Berlino oni devis altigi la nombron de juĝistoj ĉe la sociala tribunalo de 30 en 2006 al 80 en 2009 – kaj tamen tie kuŝas 16 000 neprilaboritaj dosieroj! Pli kaj pli ofte procesintaj Hartz-uloj venkis antaŭ tribunaloj. Kaj nun do la proces-lavango atingis la plej superan juĝejon, la konstitucian kortumon, kaj konsekvence la juĝistoj decidis favore al la plendintoj.

Evidente per tiuj fuŝaj leĝoj profitis entreprenoj, akciuloj kaj kapitalistoj, kaj draste perdis laboristoj. Sed anstataŭ konfesi siajn erarojn kaj korekti la leĝojn pri malaltaj salajroj, politikistoj de la nun reganta koalicio de kristan-demokratoj kaj (precipe) liberaluloj kritikis, ke la sociala subteno estas tro alta. Estas cinika logiko: la senlaborulo devas farti malpli bone ol laboranto; kaj se laboristo enspezas preskaŭ nenion, Hartz-ulo devas enspezi eĉ malpli (aŭ nenion?). Digno de



JAY D

homo, ĉu kun ĉu sen laborkontrakto, ne ludas rolon en tia kapitalisma ideologio, kiel montras alia eldiro de Westerwelle: „Kiu promesas al la popolo senpenan bonfarton, invitas al malfruromiana dekadenco.“ Ho, dekadenco! La inventinto de la Hartz-leĝoj estis poste forpelita de sia posteno ĉe Volkswagen, pro financ-manipulado (!). Ni rajtas supozi, ke li ne bezonas socialan helpon. Dekadenco? FDP, la partio de Westerwelle, draste perdis reputacion en opiniondoj.

Minimuma salajro

La registaro nun havas tempon ĝis la fino de la jaro, korekti la sistemon kondamnitajn de la konstitucia kortumo. La solvo de la problemo estus relative simpla: Oni devus enkonduki ĝeneralan minimuman salajron je nivelo, kiu respektas la homan dignon, laŭ nuna ekonomia situacio de ĉirkaŭ 8 eŭroj. La socialdemokrata opozicio postulas enkonduki ĝin – eble ĝi ja lernis el siaj antaŭaj eraroj. Sed la nuna koalicio en Berlino strikte rifuzas tion, ĝis nun, kvankam aliaj landoj havas tre bonajn spertojn pri minimumaj salajroj. En Britio, ekzemple, oni havas ĝin (nun ĉirkaŭ sep eŭroj), kaj oni ne perdis laborlokojn pro tio. Ankoraŭ la koalicio en Berlino hezitas, sed se registaro kaj parlamento ne kapablos reformi la leĝojn tiel, ke kaj laboristoj kaj senlaboruloj povas esti kontentaj, ni havos taŭgan karakterizon por tia politiko: dekadenco. ■

Forfalas la landlimoj

Antaŭ 19 jaroj civitanoj de mia patrujo ekdormis en unu regno, sed vekigis en diversaj novaj landoj. Tiel ni vivis, momente fariĝinte fremduloj al sampatrujanoj el frataj respublikoj.

Nun Sovetio ne plu ekzistas jam preskaŭ 20 jarojn. Dum ĉi tiu tempo ni rigardas trans landlimojn kaj vidas homojn similajn al ni, edukitajn per lernolibroj komunaj; homojn, kiuj posedas la internacian lingvon de nia patrujo. Nek kazaĥoj nek belorusoj forgesas la rusan lingvon. Certe, la multnombra rusa loĝantaro de Kazaĥio kaj Belorusio savas sian kulturon, estimante la morojn de aliaj nacioj en siaj hejmlandoj.

Abismoj

Ni malgaje rigardis al abismoj, kiuj kreskis dum la jaroj inter niaj novaj landoj. Eŭropaj ŝtatoj male proksimiĝis unu al la alia, sentante la neceson esti soli-

daraj, malfermi landlimojn kaj krei unuecan ekonomian spacon. Mi vidis, ke en Finnlando limgardistoj ridetas al civitanoj de Nederlando kiel al samlandanoj.

Esti gasto kaj senti sin hejme estas ĉiam agrable. Popoloj ne kulpas pri „grandaj” politikaj malakordoj. Homoj volas vojaĝi, lerni en universitatoj kaj interŝanĝi spertojn. Ili deziras liberiĝi de senbezona formalajtoj.

Antaŭ nelonge ni kun ĝojo eksciis, ke finfine niaj landoj ekiris renkonte unu al la alia. Tri ŝtatoj – Rusio, Kazaĥio kaj Belorusio – komencis krei komunan ekonomian spacon. Ekde julio 2011 la doganunuiĝo ekfunkcios, kaj la landlimoj neniigis.

Spertuloj

Opinioj de spertuloj malkongruas pri la ĉefaj demandoj, ekzemple pri la utilo por la ekonomioj de la koncernaj ŝtatoj, kiel tio influos al komerco, kaj

kia fariĝos la konkurenco ekonomia en la novaj kondiĉoj. Respondi tiujn demandojn estas zorgo de specialistoj, sed nun estas interese, kiamaniere la popoloj de la postsovetiaj respublikoj rigardas la baldaŭan reunuigon.

Multaj homoj, certe, optimisme reagis. La abismoj stringiĝas, kaj foriĝas la historia maljusteco. La fratecaj popoloj devas vivi ŝultr’ al ŝultro kaj komune lukti kontraŭ recesioj kaj, ĉefe, kreskigi estontajn generaciojn. Tre multe da studentoj el ekssovetiaj respublikoj lernas en universitatoj de Rusio.

Kapabloj

Sed baldaŭ la junularo de tri ŝtatoj rajtos senbare trovi por si laboron en la vasta teritorio de la nova ekonomia unio, agante en tre variaj kampoj. Pordoj malfermiĝos, kaj la junaj gefakuloj povos realigi sin tie, kie estos bezonataj iliaj kapabloj: ĉu en Rusio, Kazaĥio aŭ Belorusio.

Kaj tio ĉi estas la plej grava. La mondo estas tre granda, kaj ju malpli da ŝtatlimoj estos, des pli ĉiu trovos sian profesion niĉon. Tiom da obstakloj estas en la vivo; almenaŭ la artefaritaj malaperu.

Dmitriy VLASSOV
Rusio



Varmaj vortoj pri malvarma milito

La 19an de februaro la prestiĝa belga ĵurnalo De Standaard publikigis alvokon de kvar ŝtatministroj (honora titolo, kiun la belga reĝo donas al meritplenaj politikistoj) por forigi ĉiujn nukleajn armilojn en Eŭropo.

Oficiale neniam agnoskiĝis, ke en Belgio troviĝas tiaj armiloj. Ĝenerale, tamen, oni supozas, ke en la flugarmea bazo „Kleine Brogel” troviĝas inter dek kaj dudek nukleaj bomboj B61 sub respondeco de Usono.

Eksĉefministroj Guy Verhofstadt [hi vrhofstat] kaj Jean-Luc Dehaene [jalik dehane] kaj eks-ministroj pri eksterlandaj aferoj Louis Michel [louí mišel] kaj Willy Claes [ŭili klas] (ĉi tiu eĉ eks-ĝenerala sekretario de Nord-Atlantika Traktat-Organizaĵo) opinias, ke la „malvarma milito” definitive finiĝis kaj ke la usonaj nukleaj armiloj tute perdis

sian militistan signifon.

Pinta kunveno

La deklaro subtenas alvokon de prezidanto Obama, kiu organizas en aprilo pintan kunvenon en Vaŝingtono pri nuklea sekureco. La arsenalo de atom-armiloj kreskis. Pakistano, Barato kaj Nord-Koreio aldoniĝis al la nuklea „klubo” kaj oni povas supozi, ke Irano kaj aliaj landoj en ĝia regiono sekvos.

Tiel estiĝis la ideo, ke posedi grandajn nukleajn stokojn instigas aliajn landojn ne postresti. La nova politiko povus iĝi, ke posedantoj de nukleaj armiloj grade malpliigos siajn stokojn kaj ke tiu iniciato finfine iom post iom kondukos al kompleta forigo. Kio antaŭ kelkaj jaroj ŝajnis naiva revo de pacmovadoj, nun subite montriĝas ekrealigebla.

Ivo DURWAEL

UKRAINIO

Venkas Viktor



En la landaj balotoj fine venkis Viktor Janukoviĉ kontraŭ Julija Timoŝenko

En Ukrainio estas elektita nova prezidanto: Viktor Janukoviĉ, kiu en la fina baloto rikoltis 48,95 % de la voĉoj kontraŭ 45,47 % por la ĉefministro Julija Timoŝenko. Laŭ eldiroj de Janukoviĉ, la nova prezidanto celas plibonigi la rilatojn inter Ukrainio kaj Rusio kaj aliaj ekssovetiaj landoj. Cetere li intencas iom post iom plibonigi la ekonomian staton de Ukrainio. Krome li rigardas Ukrainion „ponto inter okcidento kaj oriento”. Tiurilate li intencas renkonti politikistojn el Rusio, Usono kaj Eŭropa Unio por konkretigi laborajn rilatojn.

Dmitrij CIBULEVSKIJ

BALKANIO

Paralela ne plu

Post lokaj balotoj en Kosovo, en kiuj partoprenis serboj, en la municipo Ŝterpce estis elektita Bratislav Nikolić, kiu gajnis pli ol 60 % de la voĉoj. Tamen Zvonko Mihajlović, aginta ekde 1988 en paralela institucio serba, ne volis ekŝiĝi.

Pro la insistado de Nikolić la administracio de Kosovo aplikis sian povon. Do, anstataŭ paralelaj institucioj serbaj, direktataj kaj subtenataj de Beogrado, almenaŭ kelkaj municipoj serbaj akceptis la aŭtoritaton de la nova kosova ŝtato. Simile okazis en Graĉanica kaj aliaj urboj loĝataj plejparte de serbaj etnanoj.

Tio siavice helpas la pacan progreson kaj evoluon de la regiono. Menciindas, ke la novaj instancoj de Graĉanica sendis helpon al la albana regiono Shkodër, trafita de inundo. Tiamaniere ili reciproke helpis, ĉar la albana registaro subtenis la rekonstruon de domoj en Graĉanica.

Bardhyl SELIMI



**Kontribuojn pri
la politiko
de via lando sendu
al politiko@monato.net**

ĜARDENOJ

Kun la legomoj kreskas amikeco

Antaŭ du generacioj multaj domposedantoj kulturis ĝardenon apud la domo. Multaj fieris pri sia ĝardeno, sed dum la prospera periodo inter proksimume 1980 kaj 2000 multaj domposedantoj ne emis ĝardenumi, kaj tion ne lernis la nova generacio. Tamen dum la lastaj kelkaj jaroj, precipe dum la malprospera periodo, homoj komencis denove ĝardenumi.

En Nov-Zelando, kaj supozeble en aliaj landoj, popularis ĝardenado dum la unuaj tri kvaronoj de la 20a jarcento. Ekzistis kluboj, por ke oni kune lernu kaj diskutu kaj eĉ gajnu premiojn pro la plej grandaj kaj sukaj legomoj aŭ fruktoj kaj ankaŭ floroj. Cetero multaj lernejoj posedis legomoĝardenojn.

Antaŭ unu generacio oni ĉesis instrui ĝardenadon. La lernejoj ne komprenis la avantaĝojn de propra ĝardeno kaj ne sentis bezonon kreskigi legomojn. Poste kiel plenkreskuloj ili disponis pri la monrimedoj por aĉeti ĉion bezonatan.

Sukero kaj graso

Dum tiu periodo en evoluintaj landoj kreskis la nombro de homoj, kiuj fariĝis tro dikaj, malsanaj kaj pigraj. La malsano diabeto trafis pli kaj pli da homoj, parte pro malbona dieto, tro da sukero kaj graso, kaj parte pro nesufiĉa ekzercado.

Tamen okazis diversaj reagoj, ekzemple la movado por malrapida manĝaĵo, kiu fondiĝis en Italio en 1989 kaj poste disvastiĝis alilande. Kontribuis ankaŭ renesanco de bienistaj bazaroj.

Precipe dum la lastaj du jaroj, dum

la depresio, pli kaj pli da homoj decidis, pro manko de sufiĉa mono, eble pro manko de laborposteno, ke ili ŝparu monon, kreskigante la proprajn legomojn kaj fruktojn. Por helpi tiajn homojn, oni starigis en kelkaj urboj en Nov-Zelando komunumajn ĝardenojn, kie homoj povas lerni fari kaj finfine manĝi la profiton de sia laborado.

Sakoj kaj skatoloj

Kreskis la ĝardeno-movado ne nur en Nov-Zelando sed ankaŭ en aliaj evoluintaj landoj. Kreis lernejoj novajn ĝardenojn, kie la geknaboj lernas kultivi plantojn. Samtempe ili komprenas, ke manĝaĵo devenas de plantoj kaj ne de superbazaraj sakoj kaj skatoloj.

Diversaj urboj permesas kulturi neuzatajn terpecojn por komunumaj ĝardenoj. Tio utilas al tiuj sen hejma spaco kaj ankaŭ nutras sintenon pri komunumeco, dum homoj kunestas por dividi sciojn kaj spertojn. Do kun la legomoj kreskas amikeco.

En Manukau, apud Auckland, oni starigis programon kontraŭ diabeto: partoprenantoj ekzercas sin, ĝardenumante. En Nelson alia grupo, konsistanta el pensiuloj kaj senlabor-



DREHENGSTEIN

Kreskis la ĝardeno-movado ne nur en Nov-Zelando.

uloj, formiĝis por ŝpari monon, kreskigante la propran manĝaĵon. Ofte tiaj ĝardenoj havas ekologian flankon.

Kuraĝigi kaj konsili

Ne ĉiuj komunumaj ĝardenoj sukcesis. Foje najbaroj plendas, se la aspekto ne plaĉas. Do komunuma ĝardeno en Basque-Parko en Auckland estas forigita, ĉar la volontuloj ĝin ne sufiĉe prizorgis. Helpe al tiaj homoj la magazino New Zealand Gardener (Nov-Zelanda Ĝardenisto) komencis kampanjon por kuraĝigi kaj konsili nespertajn kultivantojn. Komenciĝis samcele nova televida programo.

En Wellington, la projekto por komunumaj ĝardenoj nomiĝas Operation Green Thumb (Operacio Verda Dikfingro). La konsilantaro subtenas 90 ĝardenojn tra la urbo.

Notindas, ke la kreskanta intereso pri ĝardenoj neniel sin limigas al Nov-Zelando. Starigis novan legomoĝardenon ĉe la Blanka Domo en Vaŝingtono Michelle Obama, la edzino de la usona prezidento.

Pliaj informoj legeblas ĉe: www.nzgardener.co.nz; www.mangerecommunitygarden.com; www.communitygardenz.org.nz kaj www.slowfood.com.

D. E. ROGERS



DIRHEMENSTEIN

Ofte la privataj ĝardenoj havas ekologian flankon.

OPINIO

Unu ŝtato, du landoj



INFORMATIQUE (PERINITY.COM)

Spontanee, kaj sen subteno de la tradiciaj sindikatoj, estiĝis strikoj...

En februaro front-en-flanke kolidis du trajnoj en Buizingen [bé-zinge], Belgio. La terura bilanco estis 18 mortintoj kaj 162 vunditoj, sed la stato de pluraj vunditoj restas kriza. Kvankam daŭras esploroj de la fakuloj, redakcioj ricevis deklarojn de spektantoj, ke unu trajnkondukisto neglektis ruĝan haltigolumon.

La katastrofo sendube kaŭzis multajn emociojn, precipe ĉe fervojistoj. Spontanee, kaj sen subteno de la tradiciaj sindikatoj, estiĝis strikoj. Sed denove montriĝis tiu stranga dividlinio inter la belgoj. En Valonio, la striko estis preskaŭ kompleta, dum en Flandrio strikis fervojistoj nur ĉe la deponejo en Leuven, tie kie ili perdis kolegon pro la akcidento.

La sola klarigo pri kontrastaj reagoj tiaj estas kultura diferenco. Maloftas tiel malgranda teritorio, kie la reagmaniero tiom diferencas. Cent okdek jaroj da kunvivado en unu ŝtato kun amasaj migradoj inter la du landpartoj tute ne sukcesis ebenigi tiujn kontrastojn. Ŝajnas cetere, ke la plimulto de la politikistoj plifortigas la polarizon.

Ivo DURWAELE

KUNLABORO

Belgio eksportas siajn krimulojn

Belgio tradicie estas ŝtato, kiu vivas de sia eksporto. Ke ĝi tamen eksportas ankaŭ siajn krimulojn, jen tute nova fenomeno ...

En februaro la malliberejo de Tilburgo, suda Nederlando, estis oficiale transdonita al la belga ŝtato por „hejmigo” de belgaj krimuloj. Tio ĉi okazis en la ĉeesto de la belga ministro pri justico Stefaan de Clerck [stefán de klerk] kaj de nederlandaj ministro Ernst Hirsch Ballin [hirsĥ balin] kaj ŝtatestretario Nebahat Albayrak.

Ĉeloj

Dum la ceremonio oni ne transdonis malplenan konstruaĵon, ĉar jam en la semajnoj antaŭe 98 enkarcerigitoj estis transportitaj al Tilburgo. Laŭplane baldaŭ la ĉeloj devas esti plenaj. Ili kapablos „gastigi” 500 kulpigitojn.

La iniciato celas rompi diablan

cirklon, kiu jam de jaroj regas en la belga justico: la polico faras sian plejebulon por kapti krimulojn, kaj post la aresto kaj juĝado la koncernaj instancoj diras: „Bedaŭrinde mankas lokoj en la malliberejoj. Do vi estas libera. Bonvolu kondukti bone.” En la praktiko ĉiuj, kiuj ricevis punon malpli grandan ol trijaran, povis iri hejmen pro manko de ĉeloj.

Protesto


La franclingva Ligo por la Homaj Rajtoj jam anoncis, ke ĝi apelacios ĉe la Kasacia Kortumo kaj provos nuligi la elŝtatigon de krimuloj. Laŭ la ligo la belgaj kaj nederlandaj krimuloj certe estos traktataj per malsamaj mezuroj, kio estas komplete malakceptebla.

Krome la ligo timas, ke la enkarcerigitoj perdos la necesan kontakton kun sia familio, kiam ili estos eksterlande. La urbo Tilburgo troviĝas proksimume dek kilometrojn for de la belga landlimo. La eksperimento – se malsukcesos la ligo – daŭros tri jarojn.

Paŭl PEERAERTS

ALBANIO

Pasporto al sekureco



<https://iStockphoto.com/seriur/2008/09/einstein.jpg>

Evidentiĝis lastatempe, ke la fizikisto Albert Einstein en 1931 akiris albanan pasporton. Ne povante uzi germanan pasporton, pro sia juda deveno, Einstein verŝajne uzis la albanan, antaŭ ol li akiris svisan en 1932. Per la svisa li alflugis Usonon.

Jam en la 1920aj jaroj la Ligo de Nacioj planis krei tiel nomatan rezervujon por judoj en la nova balkana ŝtato Albanio. Tial Einstein korespondis kaŝe kun la albana konsulejo en Leipzig kaj poste alvenis sekrete al la albana ĉefurbo Tirano, kie li pasigis tri tagojn. La pasporton liveris fakte la urbodomo en la sud-orienta urbo Pogradec.

Bardhyl SELIMI/pg

Artikolojn pri la vivo en via regiono sendu al moderna_vivo@monato.net



ASSBACH (PENNY.COM)

Melkante la ŝtaton

Antaŭ kelkaj semajnoj nekonato ofertis al la registaro en Germanio komputilo-diskon kun ŝtelitaj informoj pri kontoj en Svisio. Riĉuloj kaŝe deponas sian monon en svisaj bankoj por eviti germanajn impostojn. Tio estas kontraŭleĝa kaj kontraŭsocia.

Por perfidi la „ŝtelistojn” la alia ŝtelisto postulis 2,5 milionojn da eŭroj. Tio certe ne superas la sumon de la monoj deponitaj en Svisio. Fakuloj taksas nur la prifraŭditajn impostojn je 100 aŭ eĉ 200 milionoj da eŭroj.

Ricelado

Dum sekvaj tagoj venis novaj kaj similaj ofertoj pri eksterlandaj kaŝ-kontoj. Tamen ekzistas opinioj tre kontraŭaj al la ofertoj. Kutime oni laŭdas tiujn, kiuj malkaŝas krimulojn, kaj ilin rekompencas. Ĉi-okaze kaŝe prifraŭdi milionojn da necesaj laŭleĝaj impostoj ja estas krimo. Sed konscie aĉeti ŝtelaĵon estas ricelado, kaj ankaŭ ricelado estas krimo.

Registaro ne rajtas peki kontraŭ leĝoj.

Membroj de la registaro ne samopiniis. Kelkaj argumentis, ke la ŝtelado de centoj da milionoj da impostoj pravigas la agon aĉeti kaŝe akiritajn informojn. Aliaj kulpigis la registaron kaj eĉ akuzis ĉe kortumo la kancelierinon pri ricelado.

Protektado

Sentemaj nazoj de honestaj impostopagantoj flaras strangan odoron de protektado aŭ memprotektado. Fakte multaj „impostpekuloj” intertempe mem akuzis sin pro prifraŭdo de la ŝtato je impostoj, ĉar tiukaze ili devas pagi nur la ŝuldatajn impostojn kaj ne ricevas punon.

Aliaj eventoj pli klare montras, al kiu parto de la popolo precipe servas la registaro.

Politikistoj de la Libera Demokrata Partio (FDP) persvadis siajn partnerojn de la kristanaj partioj CDU/CSU mal-



PEDRO MOURA

altigi imposton por hotelistoj de 19% al 7%. Tuj poste konatiĝis informo pri mondonaco de la hotel-branĉo al la Liberaldemokrata Partio en miliono-al-teco.

Lakto-papo

Krome estas raportite, ke Theo Müller, kiu posedas imperion de laktoproduktaj entreprenoj en Eŭropo kun 4500 dungitoj kaj jara spezo de pli ol du miliardoj da eŭroj, translokiĝis al Svisio por eviti impostojn. Tiam Müller – kelkaj nomas lin lakto-papo aŭ jogurto-mogolo – revenis al Germanio kaj konstruigis novan laktoproduktejon en Saksio, en orienta Germanio.

Kvankam ekzistas tro da laktoproduktado, la ŝtato – avida je la promesitaj 158 laborlokoj – kaj Eŭropa Unio donacis al li 70 milionojn da eŭroj. Samtempe Müller fermis alian fabrikon en Malsupra Saksio (norda Germanio), kie siajn laborlokojn perdis 175 homoj. Tiel perdiĝis sume 17 laborlokoj, kio signifas, ke la ŝtato honorigis la neniigon de ĉiu laborloko per pli ol kvar milionoj da eŭroj.

Bedaŭro

Preskaŭ ĉiusemajne germanoj ricevas leterojn, en kiuj oni informas, ke pro altiĝo de kostoj de krudmaterialo, energio ktp necesas altigi kotizojn, lupagojn, prezojn – kun bedaŭro, oni kredigas. Al kiu skribi, ke kun sama bedaŭro nepras altigi la salajron pro konstante kreskantaj kotizoj, lupagoj, prezoj? Male, ĉiu postulo pri modesta altiĝo de salajro estas riproĉata kiel utopia, mon-avida kaj ekonomie danĝera.

Sentebblas mismoralo en socia vivo kaj en politiko.

Jomo IFFELKOFER



MONKEY NET

Müller – lakto-papo – revenis al Germanio kaj konstruigis novan laktoproduktejon en Saksio, en orienta Germanio.

Ludoj kun tempo

La tempo havas fortan potencon super homoj, kaj homoj deziras superi ĝin almenaŭ en iuj kampoj, en iuj sferoj. Rusiaj potenculoj trovis eĉ tri eblojn „ŝanĝi” tempon.

Jam en majo 2008 la partio Spravedlivaja Rossija (Justa Rusio) proponis al la parlamento aboli la ĉiujaran transiron al la somera tempo (la fruigon de la horloĝoj je unu horo). La proponintoj argumentis, ke la transiro ne donas rimarkeblan energisparadon (kio estas la ĉefa celo) kaj malhelpas al la sano (post la transiro plioftiĝas akcidentoj, vokoj de ambulanco, memmortigoj).

Dekreto

Sed tiam la propono estis rifuzita. Ĝi aperis denove en novembro 2009, post la alparolo al la Federacia Asembleo fare de la prezidanto de Rusio Dmitrij Medvedev. Ĉi-foje „just-rusianoj” proponis nuligi kaj la someran tempon, kaj la tiel nomatan „dekretan tempon”. Temas pri dekreto de la sovetia registaro, akceptita en la jaro 1930, antaŭeniginta je unu horo la

tempon sur la tuta teritorio de Rusio. Nun rezulte de la „dekreta tempo” kaj la transiro al somera tempo la tempo en Rusio diferencas de la normala horzona tempo vintre je unu horo kaj somere je du horoj.

En sia novembra alparolo al la parlamento Dmitrij Medvedev parolis ne nur pri la neceso analizi la avantaĝojn kaj malavantaĝojn de la transiro al somera tempo, sed ankaŭ pri horzonoj. Nun Rusio etendiĝas tra 11 horzonoj. Laŭ la prezidanto, tio malhelpas al la laboro de la registaro, do, necesas pripensi eblon redukti tiun kvanton laŭ la ekzemplo de Usono kaj Ĉinio.

Ferioj

Sed ne ĉiuj ebloj pri templudoj ankoraŭ estas elĉerpitaj, ĉar potenculoj povas ludi kun labortagoj kaj ferioj. En 2005 Rusio unuafoje ricevis kvintagajn novjarajn feriojn, de la 1a ĝis la 5a de januaro (anstataŭ du tagoj ekde 1993 kaj nur unu pli frue). Tiuj kvin tagoj ĉiujare transformiĝas en dek pro la oficiala kristnaska ripoztago (la 7a de januaro) kaj pro sabatoj

kaj dimanĉoj. Pro tiom longaj ferioj la produktiveco falas jam fine de decembro kaj poste tre malrapide restariĝas post la reapero de homoj en la laborlokoj.

La registaro finfine decidis helpi al la civitanoj „pli efike utiligi la ferian tempon”. Eble du el la kvin vintraj ripoztagoj estos transigitaj al majo kaj aldonitaj al du aliaj festoj. Tiam oficialaj ripoztagoj estos jenaj: la 31a de decembro, la 1a kaj 2a de januaro (por festi la Novan Jaron), la 7a de januaro (Kristnasko), la 23a de februaro (la Tago de la Defendanto de la Patrio, alivorte „la tago de la viroj”), la 8a de marto (la Internacia Tago de Virinoj), la 1a kaj 2a de majo (la Festo de Printempo kaj Laboro), la 8a kaj 9a de majo (la Tago de la Venko), la 12a de junio (la Tago de Rusio) kaj la 4a de novembro (la Tago de Popola Unueco, fakte transformiĝinta eksa festo pri la Oktobra Revolucio de 1917).

Do, taksu la diversecon kaj amuzecon de ludoj kun tempo!

Anna kaj Mati PENTUS

Ricevi persatelite

Ekde multaj jaroj mi okupiĝas pri persatelita ricevado de radio- kaj televid-stacioj. Loĝante en Eupen (germanlingva parto de orienta Belgio), mi ne estis kontenta pri la kablotelevida oferto. Ĝi enhavis nur kelkajn germanajn televidkanalojn (nederlandlingvajn ciferecajn mi kaptas perantene), dum per satelito eblis kapti multajn senpagajn. Kiel komencanto mi ricevis analogajn staciojn per satelitanteno kun du ricevkapoj, nome por la satelitoj Astra kaj Hot Bird (tiam por kapti la stacion Radio Polonia en Esperanto). Poste mi transiris al cifereca kaptado, sed pro translokiĝo je nur kelkcent metroj mi bezonis du apartajn parabolajn reflektilojn por povi ricevi televidstaciojn sur

ambaŭ jam menciitaj satelitoj. Nun mi uzas la duan reflektilon por kapti elsendojn sur la satelitoj Astra 2 kaj Eurobird, ĉar tie senpage riceveblas BBC (i.a. pro ĝardenaj programoj).

Elsendoj persatelitaj okazas laŭ du sistemoj: analogaj (sur unu frekvenco troviĝas unu televidstacio kun diversaj analogaj radiostacioj aŭ stacioj de Astra Digital Radio, ADR). Ĉi-lasta havas la eblon elsendi stereofonie sur unu aŭdkanalo, male al analogaj radio, kiu bezonas du kanalojn. La analogaj sistemoj malaperos favore al la jam funkcia cifereca, ĉe kiu sur unu frekvenco troviĝas pluraj ciferecaj radio- kaj televid-stacioj. Ciferecaj elsendoj kostas malpli por la elsendantoj, sed iom pli

por la ricevantoj.

Sur la satelito Astra (19,2° oriente) troviĝas multaj analogaj kaj ciferecaj radio- kaj televidstacioj de germanaj landoj. Sur la satelitoj Astra 2 (28,2° oriente) kaj Eurobird (28,5° oriente) estas multaj ciferecaj stacioj anglaj, kaj sur Hot Bird (13° oriente) troviĝas diverslingvaj stacioj (preskaŭ triono en la itala) kaj ankaŭ Radio Vatikano en Esperanto. Sur la teksta paĝo 725 de la slovenaj televidoj 1 kaj 2 oni trovas informojn en kaj pri Esperanto. Kompreneble, ekzistas ankaŭ pli da satelitoj, destinitaj specife al Francio, Grekio, Hispanio, Skandinavio kaj aliaj kontinentoj, sed plejparte temas pri pagataj programoj.



Persatelite riceveblaj televidstacioj

Lingvoj entute 56	Hot Bird 13° oriente		Astra 19,2° oriente				Astra 2/Eurobird	
	ciferece, (analoge - ĝis majo 2012)		analoge (ĝis majo 2012)		ciferece		28,2/28,5° or. ciferece	
	televido	radio	televido	radio	televido	radio	televido	radio
angla	21	13	1		10	2	148	65
araba	89	47			5	2	7	
armena	2	1						
azera	2	2						
belorusa		1			1			
bengala							5	
berbera		1						
birma / ĥmera / somalia / vjetnama (ĉio sur la sama kanalo)	1							
bosnia		2						
ĉina	3	1			1		2	
daria	3	1						
div.	14	22		1 + 1 ADR	5	4	8	3
esperanto k.a.		1						
eŭska					1	2		
finna-sveda		1						
franca	7 (1)	11			16	28		
fr.-ar.-berbera	2	2			1	1		
gaela							1	2
germana-franca (=Arte)	1		1			1		
germana*	6	14	34	10 +46	82	81		
greka	6	5						
guĝarata k.a.							2	
hebrea/fr.	1					1		
hindia	3						5	5
hispana	4	7			11	9		
hungara	2 (1)	3 (3)						
itala	175	60			2			
japana	1				1		1	
kataluna					1	2		
kazaĥa	1							
kimra-angla							2	1
kirgiza	1							
korea	2				1			
kroata	1	15						
kurda	11	7						
kurda, persa	1							
makedona	1	1						

Persatelite riceveblaj televidstacioj

Lingvoj entute 56	Hot Bird 13° oriente		Astra 19,2° oriente				Astra 2/Eurobird	
	ciferece, (analoge)		analoge		ciferece		28,2/28,5° or. ciferece	
	televido	radio	televido	radio	televido	radio	televido	radio
nederlanda	1	3			1	16		
panjaba							3	7
panjaba-urdua							2	
persa	36	6						
pola	14	13			5	1		
portugala	2	1			2		1	1
romanĉa		1						
rumana	2	1						
rusa	11	2						
serba	2	5						
sinhala	3							
slovena	4	4						
somalia		1						
taja	2	1						
tamula	4	6						1
turka	4	4			1			
urdua	1						6	
vjetnama		1						
entute	447 (2)	267 (3)	36	11+47 ADR	148	149	193	85

ne inkluzivitaj kromaj regionaj versioj, TV-stacioj kun unuopaj bildoj, HD-TV kaj unuhore ŝovitaj „+1”

* (germana) plus programoj en la soraba (radio / TV), frisa kaj pltadiĉa (radio) sur Astra HD-TV sur Astra 4 germanaj kaj 1 germana-franca = Arte

Senpage kapteblaj programoj

En la apuda tabelo vi trovos ĉiujn senpage riceveblajn programojn de la tri menciitaj satelitoj kun la plej uzata lingvo (arabaj stacioj plej ofte elsendas novaĵojn ankaŭ en la angla kaj franca). La unua germana televido ARD elsendas sur la satelitoj Astra (analoge kaj ciferece) kaj Hot Bird (ciferece), kaj tial ĝi estas kalkulita kiel 3. Tiu tabelo ebligas elekti la deziratan sateliton laŭ via(j) preferata(j) lingvo(j).

Vi certe miras kion fari kun tiom da radio- kaj televid-stacioj. Nu, la plimulton mi tute ne bezonas, ĉar temas pri stacioj por vendoj, ludoj aŭ en nekomprenebla de mi lingvo. Depende de intereso ekzistas laŭtemaj televidkanaloj: metia amatorado (Create and Craft), geja kanalo (germana Timm TV nun elsendas pere de alia satelito), infanoj (KI.KA, Children's BBC), instruistoj (Teachers TV), klasika muziko (O

Music), kuirado (tv.gusto), kulturo franc-germana (arte), novaĵoj (BBC World, CNN, Al Jazeera, n-tv), sporto (Eurosport), turismo (Travel) kaj landaj stacioj (BBC, RAI, TVE, TV5 ktp). Inter la radiostacioj eblas elekti inter informoj kaj diversstilaj specoj de muziko: klasika, populara, danca, folkloro, kanzono ktp en diversaj lingvoj.


Jean Pierre VANDENDAELE

Brita humuraĵo

Nekredebla raporto aperis en la unua paĝo de la brazila gazetaro: la brazila polico malkovris 64 kontenerojn kun forĵetaĵo en du grandaj havenoj de la lando. La stranga importaĵo devenis el Anglio. Tiu fakto rapide fariĝis nacia skandalo. La ordinara brazila civitano konsideris la noticon kiel kontraŭnacion frapon. Ankaŭ bra-

zila civitano, prezidanto Lula, ne silentis pri la neatendita fakto.

La importaĵo entenis 1 200 tunojn da veneno, hejma rubaĵo kaj elektronika forĵetaĵo. Se konsideri, ke San-Paŭlo, kun ĉirkaŭ 20 milionoj da loĝantoj, do la plej granda urbo de Brazilo, produktas similan materialon en la daŭro de 2 horoj, la angla rubaĵo povus esti vidata kiel



BLUE SHIP



IPMARTINEAU

La brazila polico malkovris 64 kontenerojn kun forĵetaĵo en du grandaj havenoj de la lando. La stranga importaĵo devenis el Anglio.

bagatelaĵo eĉ laŭ ekologia vidpunkto. La problemo troviĝas je etika nivelo. La forĵetaĵon de tiu grandega urbo la loka administracio sendas al taŭga loko, kie tunoj kaj tunoj da ili atendas sian destinion. Bedaŭrinde la plimulto de tiu materialo ne konas la sorton de la recikligo. Sed tamen certe ĝi ne trafos iun transmaran eksterlandan havenon.

Kiel balasto ne mankis la konata angla humuro. Ironia mesaĝo troviĝis inter la eroj de la aĉa sendaĵo. Iu bonfaranto skribis jene: „Bonvolu donaci tiujn ĉi ludilojn al la malriĉaj infanoj de Brazilo.” Kaj ne nur. La sendinto zorge instruis: „Lavu antaŭ ol uzi.” Nome gravas purigi senutilajn plastajn pecojn de difektitaj objektoj antaŭ ol ilin uzi. Tian karitaton, laŭ brazila aŭtoritato, praktikas mafianoj, kiuj sendadas forĵetaĵon al afrikaj landoj.

Celante solvi la tiklan kaj malpuran aferon, la brazila prezidanto decidis sendi reen la malbonodoran komercaĵon. Forĵetaĵon tenu tiuj, kiuj produktis ĝin. Aŭ ludu mem per tiaj ludiloj tiuj, kiuj kapablas sendi ilin al malriĉaj brazilaj infanoj. Antaŭ longe Anglio sendis al Brazilo la pilkon kaj la plej popularan sporton de tiu evoluanta lando, la piedpilkon. Responde Brazilo lernis la lecionon kaj fariĝis monda ĉampiono. Se el la hodiaŭa Anglio iu mafiuo sendas forĵetaĵon al Brazilo, kiu dubus, ĉu brazilanoj estonte lernigos mondscale la arton de la etiko kaj de la etiketo?

Jozefo LEJC

FRANCIO

Pli kaj pli verda konsciigo

Okaze de la elekto al la Eŭropa Parlamento en majo 2009, nur la ĵurnalistoj miris, ke la listo de la ekologiemoj alvenis triavice, kaj tion ili ŝuldigis al la personeco de la listestro, Daniel Cohn-Bendit [danjél konbendít], prifajfante la diversajn lokajn provojn de simplaj civitanoj vivi pli kaj pli verde por protekti la planedon. Ili ĵetas la rubaĵojn jam selektitajn (vitro, plastaĵo, papero, metalaj boteloj kolektiĝas aparte, dum homoj pli kaj pli starigas hejman kompoŝtilon, simplan skatolon en la kuirejo) se ne paroli pri baterioj aŭ „monstroj” (matraco,

fridujo aŭ kuirilo), kiujn la vendisto devas, laŭleĝe, repreni, kiam oni aĉetas novan.

Kampanjoj por redukti energi-konsumadon por hejtado aŭ lumigado malpli sukcesas pro la altaj kostoj de instalado.

Pri ekologia veturado, la franca registaro estis surprizita de la granda emo al aĉeto de malpli energivoraj aŭtoj, por kiuj ĝi proponis monhelpon (ĉirkaŭ 1000 eŭroj, do dekono de la prezo) dum ĝi aldonis imposton por aĉeto de pli vo-

raj, pensante ke io kompensos la alian. Sed la francoj malpli aĉetis vorajn ol ili aĉetis malvorajn, tiel ke necesas revizii tiun monhelpon, se entute ĝi pluvivos. Jen du civitanaj iniciatoj pri nutrado kaj transportado.

Renée TRIOLLE



Elektra aŭto de nova generacio.



Mendu ĉe via loka libroservo aŭ rekte de: Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen. www.retbutiko.net retbutiko@fel.esperanto.be Prezo ĉe FEL: 24 € + afranko (papera versio), 14,40 € (ePub, Mobi aŭ PDF).

La Origino de Specioj

Karolo Darvino

Ne eblas troigi la gravecon de tiu ĉi verko.

La teorio, kiun Darvino prezentis en ĉi tiu libro radikale ŝanĝis nian komprenon pri la vivo kaj ĝia historio.

Kvankam la vivosciencoj tre multe progresis ekde ĝia unua eldono, *La Origino de Specioj* restas leginda, eĉ legenda, por ĉiuj, kiuj interesiĝas pri la teorio de la evoluo.

DE GUTENBERG AL IPAD

Parto 1:

Survoje al iu libro-normo

Kiam antaŭ deko da jaroj kliento informpetis pri difinita romano en butikoj, eble la vendisto demandis, ĉu li deziras la fortike binditan ekzempleron aŭ la poŝlibron. Se nun tiu kliento faras same, la fervora vendisto verŝajne diros, ke krom la bindita versio kaj la poŝversio li povas havigi la aŭdversion, la version por *Amazon Kindle*, la version por *Mobipocket*-legiloj, aŭ la ePub-libron, kiu taŭgas por *iPhone* kaj *Sony* kaj ... Ĉu la aĉetemo forkuros pro tiu ĝangala elekto? **MONATO** provas iom resumi la evoluon.

De Gutenberg al *Gutenberg*

Dum ĉirkaŭ kvin jarcentoj paperaj libroj kaj manuskriptoj estis la ĉefa maniero por disvastigi kaj konservi scion. Post la unuaj bibliotekoj de Johannes Gutenberg en 1455 sekvis apenaŭ kalkulebla amaso da paperaj libroj kaj revuoj. Peter Lyman kaj Hal R. Varian de la School of Information Management and Systems (Lernejo pri informtraktado kaj informsystemoj) de la universitato de Berkeley (Kalifornio, Usono) taksas, ke eldoniĝis en papera formo inter 100 kaj 200 milionoj da titoloj. Unu el la malavantaĝoj de tiu giganta amaso estas la malfacileco trovi ion. En kiu inter tiuj 100 aŭ 200 milionoj da libroj oni traktas tion, kion mi nun volas scii?

Pri tiu sama demando cerbumis Michael Hart komence de la 1970aj jaroj en la universitato de Ilinojso. Ĉar li havis grandegan kapaciton en sia universitata komputilo, li komencis tajpi ... tajpi ... tajpi. La unua „elektronika libro”, kiun li finpretigis, estis la usona Deklaro de sendependeco. Por ke kiel eble plej multaj povu profiti de lia laboro, li plusendis la libron al ĉiu, kiun li konis. Fakte, same faris Gutenberg (la unua spamisto?) 400

jarojn pli frue kun sia biblio. Pro tio Hart nomis sian planon „Projekto Gutenberg”. Tamen li mem baldaŭ komprenis, ke ne gravas dissendi. Gravas konservi. Kaj se necese, ĉio, kio troviĝas en komputilo, povas iam ajn esti kopiita kiom ajn da fojoj.

Publika havaĵo

Post tiu unua elektronika libro Hart kaj miloj da volontuloj aldonis al tiu kolekto 30 000 aliajn librojn, inter kiuj nur kelkdekoj estas en Esperanto. La celo de la Projekto Gutenberg estas kolekti kaj disponigi ĉiun tekstan verkon, kiu ne plu estas kopirajta aŭ estas en la publika havaĵo pro decido de la aŭtoro. Do la libroj de la projekto ne nur estas senpagaj, sed vi rajtas ilin pludoni, citi, dissendi, aldoni al via blogo ktp ktp. Praktike tio signifas, ke en la Projekto Gutenberg vi ĉefe trovas aŭtorojn, kiuj forpasis jam antaŭ longe.¹

Dua origina kriterio de la projekto estis, ke la verkoj estu konsulteblaj en ĉiaj komputiloj. Ili ne havu specialajn formojn tipajn por tiu aŭ jena marko, sed principe ili konsistu el „plata teksto”, el teksto sen kursivoj, sen emfazmetodoj, sen belaj titoloj. Tiu kriterio havas sian

avantaĝon (ĉiu povas legi), sed ankaŭ sian estetikan malavantaĝon.

Inko



Franko Luin, pioniro de la elektronikaj libroj en Esperanto.

Pri tiu estetika malavantaĝo konsciiis la grafikisto Franko Luin, kiu denove skanis multajn esperantlingvajn librojn kaj prezentis ilin al la publiko en tre alloga aspekto per sia eldonejo Inko. Li disponigis la verkojn en la portebla dokumentformo PDF, kiu ja ebligis modernan grafikon kaj estis tiam legebla en la granda plimulto de komputiloj. Kvan-kam Franko Luin multe tro frue forpasis,



Oni povas legi ePub-librojn en preskaŭ ĉiuj aparatoj: en komputiloj, en lertaj poŝtelefonoj kaj en preskaŭ ĉiuj poŝlegiloj.

lia projekto Inko ankoraŭ troviĝas en-rete, kaj liajn librojn oni ankoraŭ povas elŝuti.

Ciferecaj libroj

Kvankam la unuaj elektronikaj libroj datumas de 1971, la rapida evoluo de la elektronika libromarkato komenciĝis nur fine de la pasinta jarcento. En 1993 la firmao Digital Book eldonis molan disketon kun 50 libroj ne en PDF-formo, sed en propra formo, la Digital Book Format (DBF). La formo DBF ankoraŭ ekzistas, sed por legi ĝin oni bezonas specialajn programojn.

Kvin jarojn poste la usona firmao Rocket ebook prezentis la unuan

poŝlegilon kaj proponis kun ĝi aron da libroj, sed denove teknike tute alstrukturaj. La dosieroj havis la finaĵon RB (Rocket book) kaj estis legeblaj nur per la aparatoj de la firmao mem. Nun kaj la firmao kaj la formo RB preskaŭ eniris la forgesojn, sed la angla vorto „ebook” restis kaj iĝis tre populara. Supozeble ĝi ankaŭ estis ĉe la lulilo de la esperantlingva vorto „e-libro”, populara mallongigo por „elektronika libro”.²


Mobipocket

Mobipocket SA estis franca firmao, kiu verŝajne rajtas porti la titolon de „tiuj, kiuj popularigis e-librojn”. La fir-

mao fondiĝis en la jaro 2000 kaj komencis disvastigi sian librolegilon Mobipocket Reader (Mobipocket-legilo). Ĝi estis la unua programo, kiu ne apartenis al nur unu aparato, sed estis iom universala. La legilo povas ankoraŭ nun esti instalita aŭ elskatole ekzistas en relative larĝa gamo da aparatoj (Palm, Blackberry, Kindle ...), sed ne en ĉiuj. Ekzemple, la relative popularaj poŝlegiloj de la firmao Sony elskatole ne kapablas legi Mobipocket-librojn.

Ĝangalo apenaŭ travebla

La ideo de Michael Hart, ke e-libroj estu legeblaj en ĉiuj komputiloj, estis simpla kaj logika, sed li ne kalkulis pri la komercemo de la firmaoj. En nura deko da jaroj estiĝis tuta ĝangalo de libroformoj. Mortis RB, pluvivis PDF, sed naskiĝis DJVU, PRC, MOBI, AAC, WOLF, CHM, FB2, kaj la listo estas ankoraŭ longa. Ke la industrio riskis mortigi sin mem per tiom da formoj, estis klare, sed neniu ja volis mortigi sian propran formon favore al tiu de la konkurantoj. Pluraj, kaj klientoj kaj eldonistoj, estis malkontentaj pri tiu malunueco kaj komencis kunlabori en iu



La unua ĉapitro de la libro „Aventura en mondo de ŝajnigado”, kiel ĝi aspektas en poŝlegilo.



Enhavtabelo en iPhone.

malferma e-libra forumo (Open eBook Forum), kiu poste alprenis la nomon International Digital Publishing Forum (Internacia Forumo por Cifereca Eldonado). Ĝia celo estas krei libroformon, kiu povas esti legata en ĉiuj komputiloj,




En ePub-libroj la linifaldado okazas aŭtomate. Se la uzanto elektas pli grandan tiparon, la vortoj aŭtomate „fluas” al la postaj linioj laŭbezono.

en (lertaj) poŝtelefonoj kaj en poŝlegiloj kaj kiu krome ebligas la uzon de modernaj iloj, kiel menuoj, enhavtabeloj, serĉofunkcioj ktp.

ePub

La normo, kiun la forumo proponas al la industrio, nomiĝas ePub. Ĝi baziĝas sur kelkaj aliaj jam establitaj normoj, kiel XML (aro da reguloj por krei elektronikajn dokumentojn) kaj XHTML (la moderna normo por retpaĝoj). La normo ePub estas libera kaj malferma, kio signifas, ke ĝi ne estas, nek povas esti la propraĵo de iu individuo aŭ firmao kaj ke la strukturo ne estas kaŝita. Ĉiu povas publikigi librojn laŭ la ePub-strukturo sen bezono pagi al iu ajn aŭ peti ies permeson.

Libroj en la ePub-formo havas plurnajn ecojn, kiuj mankis al pli malnovaj libroformoj. La uzanto povas mem difini la grandecon de la tiparo de sia libro, laŭ la gusto, la stato de la okuloj aŭ la lumaj cirkonstancoj. La linifaldado okazas aŭtomate. Se la uzanto do elektas pli grandan tiparon, la vortoj aŭtomate „fluas” al la postaj linioj laŭbezono.



Krome, ePub-libroj povas enhavi fotojn kaj desegnaĵojn kaj nigra-blankajn kaj kolorajn. Libro laŭ la ePub-formo enhavas metadatumojn („informojn pri informoj”): en difinita loko de la dosiero estas spaco por la nomoj de la aŭtoro(j), de la tradukisto(j), de la desegnisto(j) ktp, eĉ de la skanistoj, kompostistoj, reviziistoj kaj simile, por ke la legprogramoj aŭ la poŝlegiloj povu montri ilin kaj krei indeksojn. La libroj povas krome enhavi enpakitajn tiparojn. Se vi posedas poŝlegilon, kiu ne komprenas Esperanton, ekzemple iun Sony-aparaton, tiam ePub-libro kun enpakita unikoda tiparo solvas vian lingvan problemon.

Al unu normo?

Ĉu ePub post kvin jaroj estos la normo, ankoraŭ ne estas tre certe, sed verŝajne. La praktiko montras, ke pli kaj pli da poŝlegiloj subtenas ĝin. Oni povas legi ePub-librojn en preskaŭ ĉiuj aparatoj: en komputiloj, en lertaj poŝtelefonoj kaj en preskaŭ ĉiuj poŝlegiloj. La granda escepto restas la poŝlegilo Kindle de la firmao Amazon, kiu kapablas legi preskaŭ nur siajn proprajn formojn (AZW kaj TOPAZ) kaj MOBI kaj PRC de la iama firmao Mobipocket (kiun Amazon aĉetis).

La normo PDF restas relative populara. Ĉiuj poŝlegiloj povas legi PDF-dosierojn, sed fojfoje kun mankoj (ne funkciantaj menuoj ekzemple).

Kaj Esperanto?

Ĝis la fino de 2009 PDF estis la normo por esperantlingvaj e-libroj. Ĉiuj libroj de la eldonejo Inko kaj de Flandra Esperanto-Ligo (FEL) uzis ĝin. Escepto estis multaj malnovaj libroj en la Projekto Gutenberg, kiuj uzis ASCII aŭ HTML. Pro peto de siaj klientoj FEL ekde la 1a de januaro 2010 aldonis ankaŭ ePub-librojn al sia gamo, kio montriĝis sukceso, ĉar en la unuaj du monatoj de 2010 la vendoj de ePub-libroj konsistigis 90 % de la vendoj de e-libroj entute. Ekde februaro aldoniĝis ankaŭ libroj en

la formo MOBI por la poŝlegilo Kindle kaj por multaj lertaj poŝtelefonoj.³

Paŭl PEERAERTS

En la venonta numero de MONATO: Kiun poŝlegilon mi akiru?

Notoj de la redaktoro

1. Projekto Gutenberg estas bazita en Usono kaj sekvas la usonajn leĝojn pri kopirajto. La plej ofte aplikata regulo estas, ke ĉio eldonita antaŭ 1923 estas ekster kopirajto. Dume la aferoj eldonitaj ekde 1923 eble neniam estos ekster kopirajto, ĉar la registaro kutimas konstante plilongigi la daŭron de kopirajto: por ke Mickey Muso neniam estu publika havaĵo, kiel oni duonŝerce diras. En EU la baza regulo estas 70 jaroj post la morto de la aŭtoro, do libro povas esti ekster kopirajto en Usono, sed ne en EU, aŭ inverse. Ekzistas aliaj, frati-

naj Projektoj Gutenberg bazitaj en aliaj landoj, ekzemple Aŭstralio kaj Kanado, en kiuj la baza regulo ankoraŭ estas la internacia regulo de la Konvencio de Berno, nome 50 jaroj post la morto de la aŭtoro, kvankam iuj komercaj interesoj konstante premadas la politikistojn por plilongigi la kopirajton en maniero, kiu neniel helpas la publikon kaj evidente ne povas helpi al la jam delonge mortintaj aŭtoroj.

2. La esprimoj „elektronika libro” kaj „e-libro” estas jam vaste uzataj en Esperanto. Estis proponita ankaŭ la vorto „bitlibro”, kiu eble estas pli logika, ĉar elektroniko estas nur la mekanismo, per kiu funkcias la hodiaŭaj legiloj. La difina karakterizaĵo de tiaj libroj estas, ke ili ne estas fizikaj objektoj, sed konsistas el puraj informoj, datenoj, aŭ bitoj, kiujn oni povas diversmaniere teni aŭ transsendi. „Bito”, unu aŭ nul, estas la baza unuo de informo kaj estas prefikse uzata ankaŭ en la vorto „bitbildo”.

3. Aparta problemo por cifereca eldonado estas, kiam oni kvazaŭ represas malnovan paperan libron. Kiam oni eldonas novan libron kiel bitlibron, tiam oni komencas per fidinda komputila teksto, kiun oni povas laŭbezone konverti, sed kiam oni komencas per papero, konvertado estas multe pli malfacila.

Unue, estas granda laboro; due, estas malfacile eviti erarojn; kaj trie, kelkfoje oni ne povas certe scii, kion la aŭtoro intencis. Ekzemple, ĉu dividstreko ĉe fino de linio aperus, ankaŭ se la koncerna vorto ne estus dividita inter du linioj? Tial oni volas disponigi kaj skanaĵon, bitbildon de la presita paĝo, kiu estas fidinda kopio de la originalo, kaj tekston konsistantan el koditaj signoj, kiu taŭgas almenaŭ por serĉado, eĉ se ĝi enhavas multajn erarojn. Ideale la du formoj estu kunligitaj, tiel ke eblu tuj salti de loko en unu versio al la sama loko en la alia versio. Tio teorie eblas per ePub, sed tiaj libroj estos ege grandaj kaj pluraj el la nuntempaj poŝlegiloj kolapsus sub tia „bita pezo”.

INTERRETO

Pli da diskriminacio en Interreto



Pasintjare aperis pli da diskriminaciaj kaj rasismaj leteroj en ĉenaj retmesaĝoj, en interkonajn retejoj kiel Facebook kaj Netlog, en diskutgrupoj, en blogoj kaj en la filmretejo YouTube. Tio montriĝas el jarraporto de la Centro por Egalaj Ŝancoj kaj por Batalo kontraŭ Rasismo en Belgio.

Plendoj, kiujn la centro ricevis, temis ne nur pri rasismo, sed ankaŭ ofte pri malamo kontraŭ samseksemuloj.

En 2008 alvenis 430 mencioj pri instigo al malamo. Tio kvarone superis la nombron de la antaŭa jaro. Triono de la plendoj temis pri ĉenaj retmesaĝoj kaj pri koleraĵoj inter individuoj. La centro substrekas, ke temas pri belga fenomeno, ĉar en tiu lando cirkulas pli da rasismaj kaj ksenofobaj ĉenmesaĝoj ol proporcie en aliaj eŭropaj landoj.

La aŭtoroj de tiaj leteroj penas por aspektigi ilin kredindaj per men-

cio de detalaj informoj aŭ de (falsa) fidinda fonto. Interalie cirkulas insulta ĉenmesaĝo pri imamo, kiu eĉ ne ekzistas.

Kontraŭi rasismen en Interreto ne simplas. Plej ofte ne eblas trovi la aŭtorojn. Sed la centro malfermis spacon en sia retejo por detale refuti malveraĵojn.

Ivo DURWAELE

Interlingvo: komparo inter du solvoj


Tre ofte okazis al mi, kun plezuro, laŭdi senrezerve verkojn de mia kunakademiano kaj kolego André Cherpillod. Des pli multe mi bedaŭras, ke ĉi-foje kelkajn rezervojn mi havas. La titolo „Ido, unu jarcenton poste” su-pozigus detalan portreton pri la nuna situacio. Male, la leganto trovas iom tro sintezan frazon: „Nuntempe, la Interretaj paĝaroj pri Ido asertas, ke idistojn oni nombras inter 2000 kaj 5000. Tre dubinde ...”. Nenio alia. Ke ekzistas pli ol 14000 titoloj en Vikipedio en Ido, ke la revuo Progreso daŭre aperas ekde 1908, do kun sama vivdaŭro, kiel la UEA-revuo, ke ĉiujare plu okazas kongresoj diverslande, kvankam kun nur kelkdeko da partoprenantoj, ke el la plurcentoj da artefaritaj planlingvoj nur kvin havas duliteran kodon en la internacia ISO-normaro, kaj unu estas Ido – nu, tiujn sciigojn mi estus ŝatinta trovi emfazitaj.

Estu aŭdata la alia flanko

Kelkio estas dediĉita al Beaufront; tamen Cherpillod rigardas al Beaufront kvazaŭ per ia pra-esperantista mieno, kaj li parolas pri la „oktobra perfido”, kiam en oktobro 1907 la Delegacio por la Alpreno de Internacia Helplingvo decidis alpreni Esperanton kun kelkaj reformoj. Sed la reformoj estis tiom multaj, ke ne plu estis Esperanto, sed alia lingvo. „Trompa faro de Couturat”, „hipokriteco” de Beaufront, „mitomaniulo”, „mal-honoriga rolo”, „pajlohomio” ...

Ŝajne la aŭtoro ne legis la nun abundan diverslingvan verkaron pri tiu eventoj kaj pri la homo: raporto pri la laboroj

de tiu Delegacio aperis en la franca en 1908 fare de Couturat kaj, tute senpartia kaj ekvilibra, fare de Jespersen, en Ido, en 1912 (esperantigo de Perla Martinelli en Literatura Foiro, decembro 2007, p. 294-298); en 2005 aperis la tuta leteraro



inter Peano kaj Couturat (prezento mia en Language Problems and Language Planning, aŭtuno 2007, p. 281-289); ekzegezo de Claude Gacond pri la personeco de Beaufront kaj lia graveco por la esperanta didaktiko aperis en sep sinsekvaj numeroj de Literatura Foiro, de la februara 2007 ĝis la februara 2008.

Nu, la aŭtoro el ĉio ĉi ŝajne nenion legis, kaj en la bibliografio nenio ĉi-koncerne troviĝas, kvankam lia verko estas deklarita eldonita en la kvara trimestro de 2007. Preter tiuj ĉi rimarkoj, tamen science nepravaj, li ja meritplene sintezas la historion de Ido ekde ĝia naskiĝo, ĉerpante el esperantaj kaj francaj verkoj, ne el la idaj (aŭdiatur et altera pars! = estu aŭdata ankaŭ la alia flanko!).

Esperanto estas la venkinto inter la planlingvoj, do al la plenvenkitoj, kiel Ido, oni agnoskas nenian honoron; la Esperanto-historio ostracismis ĉi tiun misnaskitan idon Ido, kvazaŭ hontante, sed certe malbenante, ke ĝi naskiĝis. Pro tiu spurado en la historio Cherpillod estas do ege dankinda; ni trovas en lia broŝuro detalojn pri la morto de Beaufront, forbruligo de liaj pape-roj, tombo kaj, en la lastaj paĝoj, pri la (magra) literaturo en Ido.

Polemika regurdo

Tre interesa estas atenta komparo inter la strukturo de Ido kaj de Esperanto, baziĝanta sur Ido-gramatikoj kaj Ido-vortaroj. Tamen tre bedaŭrinde ĝi komenciĝas per regurdo de ridinda polemiko pri intern-uza maniero kodigi la ĉapelitajn esperantajn literojn. Cherpillod ankoraŭ opinias, ke Esperanto devas esti grafike bela (por kies okuloj?) por allogi adeptojn per sia ortografio, kaj pri la x-sistemo li verdiktas: „Tiu Esperanto-karikaturaĵo, kiun kelkaj penas entrudi en la zamenhofan lingvon, forte ridigas niajn kontraŭulojn kaj decidigas ilin neniam lerni lingvon tiagrade

barbaran, tre tre tre malsuperan al Ido.” Same barbaraj al nekutimanto povas aspekti la ideogramoj aŭ la latinaj literoj kun diakritoj, kaj tamen ĉiu verkanto en lingvo kun diakritoj eldonas eksteren per diakritoj kaj solvis interne senprobleme la transkodigojn de siaj literoj al skribmaniero klakebla per ĉia klavaro kaj rete transsendebla kaj legebla ĉiuekrane. Se Cherpillod scius, ke MONATO uzas la x-sistemon por transsendo komforta cele al posta transkodigo ...

Pri la distrumpetita „internacieco” de la tute sendiakrita 26-signa latinlittera sistemo oni ege rajtas dubi; ĝin uzas preskaŭ nur anglalingvanoj, do ege malpli ol kvarono de la terglobo. Zamenhof en la Fundamento konsilis surogaton per postmeto de „h”, en la Lingvaj Respondoj eksplicite allasis surogaton per postmeto de apostrofo; interretuloj trovas pli komforta kaj uzas surogaton per postmeto de „x”, jen ĉio. Ĉar temas eksplicitaĵo pri surogato, kaj ĉar la Fundamento tute ne devigas al la h-sistemo (ĝi diras: presejoj „povas anstataŭigi per”, ne ja „povas anstataŭigi nur per”), la afero estus finita; sed aperis anatemuloj kontraŭ sistemoj, malsamaj de tiu proponita de la Fundamento. Ĝuste por silentigi tiujn mi mem iniciatis en la Akademio de Esperanto la rezolucion, ke la diversaj teknikaj elturniĝoj por la transkodigo de la ĉapelitaj literoj tute ne estas kontraŭ-Fundamentaj. Post du jaroj la Akademio fine decidis aprobi mian rezolucion, kaj tiel ĉiu retulo rajtas transkodigi, kiel li volas, sen la artefarita (pli ĝuste: arte-trudita) konscienciproĉo, ke li uzas ion nelojalan al la Fundamenta lingvo. Sed mi pardonpetas, ke, pro mia persona engaĝiteco en la akademia decido, mi lasis min treni de polemiko, kiu bezonus tomboslabon anstataŭ resurekto.

Komparo

La prezento de Ido okupas pli ol la duan duonon de la libreto. Tre zorge atenta, kun ekzemplofrazoj, estas la komparo inter Esperanto kaj Ido; kaj ekvilibre Cherpillod honeste diras siajn preferojn, kiam Idon li opinias pli taŭga ol Esperanto, kaj tre klare li prezentas la

esencan malsimilecon de la strukturoj de la du lingvoj, konfirmante, ke Ido neniel povas sin konsideri ia Esperanto reformita, sed ĝi ja estas alistruktura lingvo, kaj pri la derivmaniero, kaj pri la verboj, kaj pri la tabelvortoj. Estas bedaŭrinde, ke Esperanto ne naskiĝis kun kelkaj el la sendube superaj Ido-karakterizoj, sed oni ne pretendu, ke ĉiu ideo de Zamenhof estas la plej genia. Iuj solvoj, proponitaj en Ido, estus sendube preferindaj: tri genroj (vira, ina kaj sendistinga, aŭ, se uzi pli fakajn terminojn, maskla, femala kaj nedefinita); verboj havas tri infinitivojn (prezencan, preteritan kaj futuran) unuvorte esprimeblajn; la pasiva verboformo povas esti kaj analiza kaj sinteza, kaj tiurilate rimarkinda estas la iompostioma moderna evoluo de Esperanto al la uzado de pasivaj formoj, kiel „amatas”, „amitas”, paŭsantaj formojn, normalajn en Ido.

Same iuj sufiksoj, malfrue venintaj en Esperanton, kiel „iv”, „oz”, „iz”, havas inspiron el Ido. Cherpillod apogas tiun analizon de la esperantaj vortoj, kie finaĵoj, prefiksoj kaj sufiksoj estu memstaraj vortoj; se tiel, oni konsekvence antaŭenpaŝu kaj agnosku, ke ankaŭ radikoj estas memstaraj vortoj. Ja, se en „labor-is” la finaĵo „is” estas memstara vorto, do ankaŭ „labor” estas memstara vorto, kaj „laboris” aspektas tute ordinara kunmetaĵo. Al la ekzemplo de Cherpillod, tute ĝusta, kvankam ne kutima, „Ĉu vi lavis la teleraron?” „Ne is, sed os” oni povus analoge respondi: „Ĉu vi lavis la plankon?” „Ne lav, sed bala”; esprimo tute logika kaj komprenebla, eĉ se ankoraŭ (tute) ne uzata. Kaj tiu analizo ĝustigus ankaŭ alian ekzemplon de Cherpillod, kiu diras, ke „laborema” ne estas derivaĵo de „labori”; tute prave, sed ankaŭ ne kunmetaĵo de du vortoj „labori” kaj „ema”, kiel li, bedaŭrinde, diras; en tia analizo la vortoj estas tri: „labor”, „em” kaj „a”.

Ĉe la fino de la lego estas demando: kial Ido fariĝis konkuranto tiel febla de Esperanto? Finfine, ĝi havis kelkajn tute bonajn atutojn, kiujn ĉi tiu libreto evidentigas. Kial idistoj ne kapablis altiri pli multe da adeptoj, precipe post la dua

mondmilito? Finfine, tiam estis granda spaco por malfermo de komunikado kaj ankoraŭ granda nekono de fremdaj lingvoj. Malfacilas la respondo, kiel ĉiam, se temas pri sociaj fenomenoj. Prave Cherpillod rimarkas, ke la evolupovo de Esperanto estas senlima, do alia lingvo ne necesis al la esperantistoj, kiuj nur etparte transiris al Ido. Ido do ne povis ĉerpi el jam preta puto de la esperantistaj grupoj, kiel male faris Esperanto kun la volapukistoj. Al tio aldoniĝas la fakto, ke, se en kelkaj eĉ gravaj punktoj Ido superas Esperanton kaj alidetales ili povas egalmerite rivali, en la tuto Esperanto aspektas pli fleksebla kaj pli facile lernebla, precipe por neokcidentanoj, kiuj en Ido ne trovas tiujn leksikajn avantaĝojn, troveblajn de latinidlingvanoj. Krome, tute paradokse, la tuj aperinta Ido-Akademio unuflanke decidis ŝanĝojn ĝis 1913, tiel malstabiligante la lingvon, poste pro insistado de Couturat ĝin gipsumis.

Valora kontribuo

Ido naskiĝis kiel lingvo desupra, teoria, kiu evoluas per akademiaj decidoj. Esperanto ĝuis (feliĉe!) dek ok jarojn sen Lingva Komitato, do la lingvon stabiligis la popolo per sia uzado kaj povis senti ĝin sia. La ombro de Zamenhof estis ĉiam malantaŭe, sed sen troa pezo. Tute adekvata do estas la grafikaĵo, komparanta la du evoluoprocezojn. Lerni tra ĉi tiu broŝuro pri Ido, fakte ne ido, sed nur kuzo de Esperanto, estas tre utile, ĉar oni komprenas ankaŭ multon de Esperanto mem, pri tio, kiel funkcias planlingvo, pri la ĉefaj principoj, kiuj igas lingvan strukturon kohera, pri reciprokaj influoj inter planlingvoj. Precipe kursgvidantoj trovos tie argumentojn por konvinkiĝi pri la boneco de la solvo, kiun la esperantistoj favoras. Entute tre valora kontribuo al la studado de interlingvistiko ĝenerale, de Ido kaj de Esperanto.

Carlo MINNAJA

André Cherpillod: *Ido, unu jarcenton poste*. Eld. La Blanchetière, 2007, 50 broŝuritaĵoj.

Prezo ĉe FEL: 5,10 eŭroj + afranko.

Ĉarma, originaltema kaj pensiga

Ĉi tiuj tri noveloj, kun belaj, samstilaj kovriroj, formas iun etan serion. Kvankam ne temas pri la sama ĉefrolulo, la temo estas simila en la tri rakontoj: la interagoj inter afrikanoj kaj blankuloj. Tamen la rakontoj sufiĉe diferencas, interalie, ĉar ili okazas en aliaj historiaj tempoj.

En la unua duono de *La paŝo senelirejen* Biova kreskas kaj fine, post longa atendado kaj multe da espero – pere de ceremonio – iĝas viro. Sed la feliĉo ne longe daŭras ... alvenas „flosanta domo” kun „bruligitaj homoj”, kiuj mortigas kelkajn vilaĝanojn. Necesas debatoj pri tio, kiel reagi al tiuj ŝajne nevenkeblaj homoj. Oni decidas, ke Biova iru por lerni ilian lingvon kaj tiel iĝi same inteligenta. Pasis generacioj, kaj kelkaj homoj tre bone adaptis sin al la ĉeesto de la blankuloj, kaj bone lernis, kiel utiligi la bonajn rilatojn kun tiuj riĉuloj. Regas speco de demokratio, sed nur por pruvi al la mondonacantoj, ke indas donaci monon al tiu vilaĝo; venas tiom da mono, ke la ricevantoj preferas aĉeti kastelojn en la blanka mondo ol konstrui pliajn en la vilaĝo. Tamen la simplaj homoj, kiuj ne havas tiajn rilatojn kun la blankuloj, perdis sian kulturon kaj siajn loĝlokojn, ŝajne, sen elirvojo. Tiel ĉi tiu koloni-etosa rakonto finiĝas sufiĉe negative.

La dua novelo traktas ĝuste tion, kion sugestas la titolo: *Dialogo inter surduloj*. Kiel infano Dege kreskis ĉe la blankuloj, kaj nun estas „nigra-blankulo”. Post jaroj li kiel plenkreska „sukcesinto” revenas de tempo al tempo al



la vilaĝo kaj rakontas pri siaj spertoj en Jovotome, la blanka lando. Sed la homoj ne povas kompreni lin, kvankam li ankoraŭ parolas la lokan lingvon, eĉ se miksitajn kun iom da francaj vortoj. Ĉe la fino de la novelo la vilaĝanoj komencas uzi la teknikaĵojn de la blankuloj, sed tio ne nepre feliĉigas ilin.

En ĉi tiuj unuaj du rakontoj estas iom da magio, kio starigas demandojn, kiuj pensigas la leganton. Unuflanke, tio donas iom da spico al la rakontoj, sed aliflanke, se la respondoj ankaŭ ĉe la fino ne venas ... tio donas iun ne tre agrablan senton. Tamen kelkaj detaloj, kiuj povus starigi demandojn, fakte eble estas nur mistajpoj ... ekzemple en la unua novelo, la voduo Dan estas unue „blanka virino” kaj du liniojn poste „li”.

Aventuro de ŝajnigado ludigas en nia epoko de migrado de multaj afrikanoj al okcidentaj landoj. Jeko, la ĉefrolulo, kiu multe similas al la aŭtoro, migras de Afriko al Germanio kaj poste al Kanado. Li volas lerni pri la miraklo de la sukceso de la blankuloj, sed malesperigas pro la multaj kontraŭdiraj konstatoj.

En Kanado li edziĝas kaj eksedziĝas, kaj ankoraŭ priskribas la malfacilaĵojn kun dualiaj partnerinoj. Ĉu la malfacilaĵoj estiĝis nur pro la kulturaj diferencoj? Unu afero certas por Jeko: estas multe da ŝajnigado en la blankula mondo. Kaj li komencas listigi kaj priskribi plurajn ekzemplojn de tiu ŝajnigado: la mizero en Jovotome kompare al la emo helpi al afrikaj landoj, la hipokrita toleremo, la iluziplena libereco ... Sed li konkludas, ke, tamen, estas pli da similecoj inter

la homoj ol da malsimilecoj. Sed estas malfacile tion klarigi al la homoj en lia naskiĝvilaĝo, kiuj konsideras Jovotome daŭre kiel la paradizon sur la tero. Ĉi tiu rakonto estas la plej realisma, malplej magia el la tri, sed starigas aliajn, eble ne por ĉiuj tre agrablajn, demandojn pri kulturo, toleremo ktp. La lingvaĵo de la rakontoj estas sufiĉe flua, sed kio vere ĝenas dum la legado, estas multaj mistajpoj kaj gramatikaj kaj leksikaj eraroj. Ili aperas precipe en la unua novelo, sed ne nur, kaj eĉ en la dorsflanka teksto. Tamen la unuaj du jam unue aperis en la reto en respektive 2001 kaj 2002. Ĉu ne sufiĉe da tempo por provlegigi antaŭ la eldonado?

Konklude, estas ĉarmaj, originaltemaj kaj pensigaj noveloj, kiuj montras iun nekutiman rigardon al la rilato inter blankuloj kaj afrikanoj en diversaj epokoj, sed kiuj, bedaŭrinde, ne ricevis la necesan redaktan atenton.

Heidi Goes

Jean Codjo: *Aventuro en mondo de ŝajnigado*. Eld. Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno, 2009. 44 paĝoj. ISBN 978-9077066-42-3.

Prezo ĉe FEL: broŝurite: 6 eŭroj + af-ranko; e-libro: 3,60 eŭroj.

Jean Codjo: *Dialogo inter surduloj*. Eld. Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno, 2006. 52 paĝoj. ISBN 90-77066-26-8.

Prezo ĉe FEL: broŝurite: 6 eŭroj + af-ranko; e-libro: 3,60 eŭroj.

Jean Codjo: *La paŝo senelirejen*. Eld. Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno, 2006. 44 paĝoj. ISBN 90-77066-27-6.

Prezo ĉe FEL: broŝurite: 6 eŭroj + af-ranko; e-libro: 3,60 eŭroj.

anoncetoj

Vizitu **Ipernity**, la socian retejon, kie Esperanto estas unu el la plej ofte uzataj lingvoj. En ĝi kelkaj miloj da Esperanto-parolantoj kune babilas, montras siajn fotojn, pridiskutas mem faritajn filmojn, kunhavigas sian blogon ... Krozu al www.iper-nity.com/?lg=eo Tie vi trovos ankaŭ plurajn numerojn de MONATO senpage elŝuteblajn.

... **jarfine al IF!** Festu novjare kun ni la plej faman aranĝon por familioj kaj plenkreskuloj! Kun ampleksa prelega programo dumtage, kun tuttaga ekskurso, kun alloga vespera propono, kun silvestra bufedo kaj silvestra balo, kun apartaj programoj por infanoj kaj gejunuloj, kun la fama kaj ŝatata trinkejo "Knajpo". Petu informojn de IF, Platz, Postfach 1148, D-34303 Niedenstein. Tel./Fakso: +49 5624 8007. Interrete: www.internacia-festivalo.de.

"**Naturista Vivo**", la ilustrita revuo por nudistoj/naturistoj/nudnaĝantoj. Belaj koloraj fotoj. Senpaga provkzemplerio. La revuo aperas 4-foje jare, sur 16 paĝoj. Internacia Naturista Organizo Esperantista. Adreso: Jozsef Nemeth, HU-8531 Ihász, Fő u. 41/5. Rete: jozefo.nemeth@gmail.com.

Esperanto-instruistoj: vizitu www.edukado.net. Ĉio de vi por vi!


Kreu vian propran librokatalogon! Per la Retbutiko www.retbutiko.net vi povas krei librolistojn laŭ via propra deziro! Ĉu libroliston pri nur romanoj, aŭ pri poezio aŭ pri ĵus aperintaj verkoj? Tio eblas en la Retbutiko en momento kiu plaĉas al vi, tage kaj nokte, senpage. Vizitu nin en www.retbutiko.net!

Prezo por anoncetoj (nur teksto, sen fotoj, desegnaĵoj aŭ kadroj): 1 eŭro* por unu linio. Sama anonceto kvinfoje sinsekve: triobla tarifo. Sama anonceto ankaŭ en la reta versio de MONATO: duobla tarifo. Minimuma faktursumo: 12 eŭroj*. Por pli grandaj anoncoj petu la tarifon de la eldonejo aŭ rigardu al http://www.esperanto.be/fel/mon/mon_anon.php.

*Por Eŭropa Unio: + 21 % AVI.

La ondo de esperanto

Ĉiumonata soci-kultura revuo en Esperanto



Fondita en 1909. Refondita en 1991. Eldonata en Rusio

Abonebla kontraŭ

mare 38 EUR

aere 43 EUR

rete 12 EUR

ĉe UEA, FEL, ELNA, UFE, EAB, SEF kaj dudeko da aliaj landaj perantoj

- Tiel ni vivas: raportoj el la postkomunisma mondo
- Tra Esperantujo
- Niaj problemoj: revuoj, eseoj, intervjuoj, polemikaĵoj
- Lingvaj respondoj de Sergio Pokrovskij
- Historio kaj kulturo de Esperanto
- Recenzoj pri la novaĵoj de la libromarkato
- Mozaiko: krucvortoj, konkursoj, kvizoj, humuraĵoj
- Literatura suplemento semajnfine

SOCI-KULTURA REVUO EN ESPERANTO

Senkultura homo estas sklava besto (Cicero)

ISSN 0299-6987

LA GAZETO

MONDKULTURA
SENDEPENDA
ESPERANTISMA

Petu provnumeron ĉe: LA GAZETO
12 sous la Ville, 55210 CREUË (Francio)

lagazeto@osiek.org

<http://www.lagazeto.com>

La KancerKliniko

Politika Kultura Skandalema Ajnista

4 numeroj jare + La Krom

ikk@free.fr

Regulaj kunlaborantoj: Serge Sire, Michel Duc Goninaz, Manuel de Seabra, Kris Long, Hu Guozhu, Ionel Onet, Mikaelo Bronŝtejn, Arnau, Laŭrenco Septier, Mao Zifu, Jopetro Danvy, Petro Braŭn, Gennadij Turkov, Fra Gaeta, Roger Siarri, Ŝarlerik d'Arroi, Ĵak Le Puil, ktp.

Abono: 25 € (ekde 14 en kelkaj landoj)
Jacques Le Puil, pĉk 12 729 73 X Paris
aŭ ĉe FEL, UEA, Esperanto-USA, ktp



LA GRAFO DE MONTE- KRISTO

**La vivoverko de Alexandre Dumas
kaj
la vivoverko de tradukisto Daniel Moirand
baldaŭ aperos!**

Oni kutimas konsideri la libron *La Grafo de Monte-Kristo* kiel la ĉefverkon de A. Dumas. Ĝi estas vere fascina. Ĉiu plia (re)legado ebligas trovi ion novan, novan interpretadon, novan aspekton ...

La ĉefrolanto, Edmond Dantès, perfidita pro kalumnia denunco, estas enkarcerigita dum dek kvar jaroj en la malliberejo de la kastelo If, sur insuleto apud Marsejlo. Tie li konatiĝas kaj amikiĝas kun sammalliberejano, abato Faria, kiu transdonas al li la sekreton pri la loko de kaŝita trezoro. Post lia forfuĝo el la malliberejo kaj rekupero de la trezoro, la strebo de lia tuta vivo, danke al supera riĉeco kaj inteligenteco, estas venĝi sin kontraŭ tiuj, kiuj atencis lian juncon, lian feliĉon.

A. DUMAS



**LA GRAFO DE
MONTE-
KRISTO**

FEL

La klasika bindita versio enhavas 1184 paĝojn kaj konsistos el 2 binditaj volumoj. Ĝia prezo estos 96 eŭroj + afranko. Kiu mendas kaj pagas la du volumojn al FEL **antaŭ la 1a de majo 2010** pagu nur 64 eŭrojn inkluzive la kostojn de registrita alsendo. Krome la verko estos ricevebla kiel e-libro en la formoj ePub, Mobi kaj PDF kontraŭ 32 eŭroj.